53 (71) MARTO/APRILO 1984 ISSN 0150-5823

Dumonata kultura informilo k esprimilo esperantista
Unu n-ro : 4 FF. Unujara abono kun adresaro : 20 FF
Ĝiri al la poŝtkonto 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto:
Cercle amical espérantiste de l'Agenais, F 47340 LAROQUE TIMBAUT

****************************************************************

# LA VOJO AL LINGVA MAJSTRECO

*Por majstri en iu lingvo, necesas :*

1. *Funde koni la gramatikon kaj rigore aplikadi ĝiajn regulojn.*
2. *Posedi ampleksan vortarscion, kaj ĉiam elekti la ĝustan vorton en ĝia preciza signifo.*

*Necesas ja, sed ne sufiĉas.*

*Kion plian oni do bezonas ? Kapablon flue esprimi pensojn kaj sentojn per skribo kaj parolo.*

*Malmultaj estas dotitaj per talento. Ne ĉiuj povas egali la brilan retorikan arton de Lapenna aŭ la elegantan plumostilon de Waringhien. Sed ĉiu povas almenaŭ celi senĝenan esprimadon per buŝo, plumo aŭ tajpilo. Por ĝin atingi necesas pensi senpere en la uzata lingvo. Komencantoj, krom la tre raraj denaskaj esperantistoj, pensas en sia gepatra lingvo kaj mense tradukas frazon post frazo. De tio rezultas hezita, ŝvita, iom lama interpretado. Sed iom post iom, dank'al akirita kutimo, la lango aŭ la mano liberiĝas el tiu truda ekzercado.*

*La parolanto aŭ skribanto kutimiĝas, eĉ nekonscie, senpere pensi en Esperanto. Tiel li eskapas el la katenoj de la mensa tradukado. Li atingas la ŝtupon difinitan de Boileau : "Kion oni bone konceptas, tio klare esprimiĝas, kaj la vortoj por ĝin diri facile venas". La plumo kuras sur la papero, la fingroj frapas la klavojn de la tajpilo, kiel tiuj de parkere ludanta virtuozo sur la klavojn de la piano, la parolo flugas kiel birdo en libera aero, la pensoj aŭ sentoj facile formuliĝas. Kiuj ĉeestis, en la tempo de Lanti, pasiajn diskutojn en la pariza laborista grupo, tiuj scias, pri kio temas. Tiam oni ne baraktis, cerbumante por serĉi vortojn kaj esprimojn en sia memoro. La frazoj, admonoj, interjekcioj, sakraĵoj, foje insultoj, spontanee elŝprucis. La diskutantoj aŭ disputantoj ne estis famaj oratoroj, sed ili facile parolis, ĉar ili pensis senpere en Esperanto.*

*Sed, demandos iuj, kiel atingi tiun nivelon, kiel ricevi tiun kapablon?*
*Jen recepto :*

1. *Multe legi, kun PIV apud la mano : verkojn de Zamenhof kaj de bonaj aŭtoroj, revuojn, gazetojn kiel "Laŭte!"*
2. *Persisteme ekzerciĝadi al interparolado en Esperanto, eĉ kun samnaciaj samideanoj, en grupkunsidoj, intergrupaj kunvenoj, staĝoj, regionaj, naciaj, internaciaj kongresoj.*

*Per tia ekzerciĝado oni ricevas progresojn pli rapidajn, ol oni antaŭe supozis.*

***Valo.***

*****************************************************

## EL LA "LAŬTEJO" :
### ĈU PLU BROŜURUMI ?

El preskaŭ 400 legantoj de "L!" nur ĉ. 80 estas samtempe abonantoj de la broŝurservo. Se "L!" prosperas, la broŝurservo stagnadas. Nu, ambaŭ aferoj estas iel solidaraj: la broŝuroj plejofte temas pri aferoj, kiujn oni povas nur supraĵe aludi en "Laŭte!", male, en "Laŭte!", ĉiu povas libere sin esprimi pri temoj traktitaj de la diversaj broŝuraŭtoroj.
Paradokse, dum la financa situacio de la broŝurservo povus esti sana, dum plu alvenas proponoj pri publikigo de novaj manuskriptoj, stoke amasiĝas la broŝuroj en la broŝurejo pro tre nesufiĉa vendebleco. Se mi, kiel eldonanto, relative bone elturniĝas nun por prepari

(daŭrigo sur la antaŭlasta paĝo!)

# leo polak

# unueco super prokreda dividiĝo

Cercle espérantiste de l'Agenais
"Laŭte!" * F 47340 Laroque Timbaut
1983 * 3 FF

SAT
broŝurservo

Nura nekredo ankoraŭ ne estas libera pensado; nura negativa "sendieco" ankoraŭ ne estas pozitiva racieco aŭ moraleco, se ne paroli pri toleremo, tiu same rara kiel rava frukto de la arbo de l' Objektiveco.

Leo Polak.

***Enkonduke***

*Profesoro doktoro Leo Polak naskiĝis la 6-an de januaro 1880 en Steenwijk, malgranda urbo en la Nederlanda provinco Overijssel. Li studis juron en la universitato de Amsterdam kaj doktoriĝis per jura-filozofia disertacio. Poste li ricevis honoran doktorecon kaj en 1929 fariĝis profesoro pri filozofio ĉe la universitato de Groningen, Nederlando.*

*Prof. Polak estas unu el la grandaj reprezentantoj de monisma, liberpensa, do senkreda filozofio. Li pasie defendis la aŭtonomian, t.e. la propra-norman filozofion kontraŭ la heteronomia, t.e. la ordona kredomoralo. Klare kaj konvinke atestas pri tio lia ĉi-sekva radioparolado el 1931, kiu estas ankoraŭ tute aktuala. La noticoj kiujn li poste publikigis rilate al la parolado vidigas lian larĝan menson kaj profundan humanecon.*

*Komence de 1941 la tiama rektoro de la Groninga universitato denuncis Leo Polak al la nazia "Sicherheitsdienst" ("sekurpolico"), tiel ke oni arestis lin. Kiam di-kreda samĉelano en la prizono cerbumis pri la "postmorta mondo", Polak ĝemis en sia taglibro : "Jes, tiu estos la vera liberiganto kiu liberigos nin de la Liberiganto."*

*La 9-an de decembro 1941 la kuraĝa, humanisma filozofo mortiĝis en la koncentrejo Sachsenhausen en Germanio. La torturistoj povis rompi nur lian korpon, ne lian spiriton. Leo Polak konsekvence* ***vivis*** *sian filozofion - granda escepto - kaj ankaŭ pro tio restos lumturo en tempoj de barbarismo kaj malespero.*

*En septembro 1983* *Feiko Munniksma*

Radioparolado farita de Prof. d-ro Leo Polak por la Liberpensula Radiodisaŭdiga Unuiĝo (Nederlando), sabate, 21. marto 1931.
Elnederlandigis : Feiko Munniksma.

## UNUECO SUPER PROKREDA DIVIDIĜO

En ĉi tiu grandvalora, mallonga horduono de granda escepto, per kiu ni samtempe anoncas la novan printempon, penetru en vian koron, en vian animon kaj en vian prudenton **la voĉo de la Libera Penso.** Tiu voĉo estas levita super ĉia persona, politika kaj partia interesoj, super ĉia eklezia aŭ sekta intereso, super ĉia kredodiferenco kaj religia rankoro, super ĉiuj tiuj potencoj kiuj akuzas unu la alian pro herezo, plie disfendas nian kompatindan, disŝiritan, dispecigitan mondon kaj eterne disfremdigas la homojn. Temas pri la voĉo de la plej profunda, plej sankta unueco kaj komuneco de ni ĉiuj, pri la voĉo de la por ĉiuj validaj **universalaj vero, justo kaj amo.**

"Rezonado kaj filozofado panon ne donas". Kie estas la volo labori, tie estu la eblo honeste perlabori la ĉiutagan panon. Ve al la socia malbeno de l'senlaboreco.

Sed per pano sola la homo ne vivos kaj ne povos vivi. Li ankaŭ havas aliajn ol materiajn, li havas **spiritajn** bezonojn. Spirita, ne en la senco de la spirito de l'ekleziuloj, kiuj diras al vi "surtere ne estas la feliĉo", kaj trompe promesas al vi alian ol nian realan mondon, mondon de l'kredo, postmortan mondon, sed **spiritaj** bezonoj en senco kiu **surtere** validas por ĉiu el ni : la sopiro kaj soifo al vero, al justo **ĉi tie, surtere.** Ni volas scii kaj kompreni **ĉi tie** kio estas la plej profunda senco de mondo kaj realo, de vivo kaj morto ; ni, kiel raciaj estaĵoj, serĉas respondon al tiuj eternaj demandoj pri **kielo** kaj **kialo,** pri esenco kaj fundamento de ĉiuj aĵoj, pri la eterna distingo inter bono kaj malbono, justo kaj maljusto, vero kaj iluzio.

Nu, al ĉi tiuj pridemandoj de l'instruo pri mondo kaj vivo la mil kaj unu religioj jam de plej frua tempo donas siajn milspecajn, diferencajn, kontraŭajn respondojn de l'kredo... La religioj kun siaj dioj kaj diinoj, siaj di-personoj, anĝeloj kaj diabloj, potencoj de ĉielo kaj infero, siaj fantomoj kaj demonoj, kiuj postulas timon, respekton kaj ekzorcon per pentofaraj oferoj kaj magiaj formuloj, per rito kaj ceremonio ; la religioj, kun sia antaŭnaska mondo kaj sia postmorta mondo, siaj subteraj mondoj kaj superteraj mondoj, siaj regionoj de infero, purgatorio kaj ĉielo... ; la milspecaj elpensaĵoj de la milobla mitologio, la laŭ popolo, tempo kaj kulturo ŝanĝiĝantaj, variantaj respondoj de la centoj da sanktaj libroj kaj skriboj, la di-revelacio kaj sanktaj tradicioj de Ĉino kaj Egipto, kristano kaj budhisto, judo kaj mahometano, ŝamano kaj ŝintoisto, vedisto kaj Parsio, ĉiuj kun siaj sanktaj pastroj kaj predikistoj, kun siaj di-scientistoj, ekzegezistoj kaj leĝoscientistoj.

Kaj ĉiu el tiuj kontraŭaj, batalantaj respondoj de la mil kaj unu religioj kaj sektoj postulas **kredon**, postulas akceptadon de difinitaj dogmoj, de la doktrinoj de l' "vera instruo", kiun pro ties supernatura deveno oni nomas "revelacio", levita super kritiko kaj racio.

Kaj ĉiu el tiuj mil kaj unu formoj de kredo havas sian **komunumon**, sian propran **grupon**, jen kelkajn centojn, jen centojn da milionoj, kiel la konfesantoj de Budho, de Kristo, de Bramo. Kaj kio kiel "dia" vero estas gravurita en la sendefendan infan-animon por la vivo en miloj da kazoj **interne de** la grupo, tio estas "kondamninda mensogo", "pastra trompo", "ĉarlatanado" por la alipensantaj mildekoj **ekster la grupo.**

La **propra** kredo de ĉiu grupo nomiĝas "sankta", kaj la sankta kredo de ĉiuj aliaj grupoj, de multaj milionoj da aliuloj, nomiĝas "superstiĉo", "sakrilegio", "idolkulto". Ĉiu grupo rigardas la diajn revelaciojn, la sanktajn skribojn, la koranojn, la bibliojn, la librojn pri la reĝoj, kaj la vedojn de ĉiuj aliaj grupoj kiel mizerajn idoligitajn elpensaĵojn de l'homo, kiuj false prezentas sin kiel la "Vorton de Dio"... Kaj la tero iĝas ruĝa pro la sango de la sanktaj militoj por la sankta kredo de parsioj kaj lamaoj, judoj kaj paganoj, protestantoj kaj katolikoj, mahometanoj kaj hinduoj. Tiele la **sektoj** kaj la **sektanoj** tranĉas kaj noĉas en korpon kaj animon de la kompatinda sanganta homaro...



Tiel la religio estas la granda disfendanto de la kulturo, kiu incitas popolon kontraŭ popolo, genton kontraŭ gento, vilaĝon kontraŭ vilaĝo, familion kontraŭ familio, edzon kontraŭ edzino kaj fraton kontraŭ frato en la plej akra, la plej principa, la plej fanatika malamikeco, nome : la proreligia malamo, la kredo-malamo. Ĉiuj civilizitaj lingvoj de la mondo konas la vortojn "proreligia malamo" kaj "kredo-malamo", sed "proreligia amo" aŭ "kredo-amo", kiel speciala speco de amo al kunhomoj, estas nekonata vorto en ĉiuj lingvoj de l'mondo. Ĉar oni havas **la** amon, la ununuran, veran, puran amon, aŭ oni ĝin **ne** havas, kaj tio havas absolute nenion komunan kun religio aŭ kredo. **Tio** ne estas afero de kredo aŭ instruo, sed de **karaktero**, de la **koro**. En tiu demando la fakto ke oni estas katoliko aŭ protestanto, pagano aŭ kristano, judo aŭ mahometano estas tute same sensignifa kiel la indikoj germano aŭ semido, ĉino aŭ eŭropano.

Por ĉiu kredo, kiel ni vidis, ĉiu alia kredo estas superstiĉo, ĉiu sankta skribo de aliuloj mizera, idoligita elpensaĵo de l'homo. Tia kredaro ne povas rezisti al la nedogma, senantaŭjuĝa ekzameno, al la nekreda scienca kaj filozofia kritiko, kaj do montriĝas iluzio, eraro kaj memtrompo... Tiel ĉiu religio, ĉiu kredo sonĝas sian propran sonĝon, vivas en sia propra sonĝomondo kaj rigardas tiun kiel la unusolan veran realaĵon, kiu devas esti unu kaj la sama por ĉiuj.

Ho homo, vekiĝu el ĉi tiu abomena sonĝo. La tagiĝo de la libera penso ekbrilas sur la firmamento. La romantikuloj laŭplaĉe moku : la homo estas reĝo kiam li revas kaj almozulo kiam li pensas; ni respondas : pli reĝa estas la almozulo en la regno de l'vero ol la reĝo en la regno de l'revoj.

Vekiĝu al la unusola vera, por ĉiuj validaj vero kaj realo, al la lumo de l'eterneco **interne de vi,** unu en ni ĉiuj ; al la universala, tio estas la **universale valida,** ne plu roma aŭ juda aŭ protestanta aŭ mahometana, sed **homa racio kaj racieco,** al la **universala,** ne plu roma aŭ juda aŭ protestanta aŭ mahometana **amo kaj justo.**

Kie ni trovas tiun klaran eternan lumon, kiu al niaj plej profundaj spiritaj demandoj pri mondo- kaj viv-instruo donas simplan respondon validan por **ĉiuj** kaj **ĉiam** ; kie ni trovas nian mond-unuecon kaj nian mondpacon kaj nian mondkomunaĵon ? Ne en la obskuraj labirintoj de la kredodogmoj, sed en la **"natura lumo",** la **"lumen naturale"** de la en ni ĉiuj vivanta **Racio,** kiu manifestiĝas en nia natura, prudenta kaj morala sento kaj konscio; tiu logika kaj etika Racio, kiun Spinozo nomis "la plej alta talento" de ni ĉiuj kaj "la suno en la regno de vero kaj saĝo" kaj kiu laŭ Kantio estas nia "plej alta bono surtere". "Akceptu, diras Kantio, tion kio ŝajnas al vi plej kredinda post zorga kaj honesta ekzamenado, ĉu faktojn, ĉu argumentojn, sed gardu vin kontraŭ unu afero: ne kontestu al la Racio tion kio ĝin igas la plej alta bono surtere, nome la privilegion esti la lasta provoŝtono de l'vero. Se vi agas male, tiam vi, malinda je ĉi tiu libero, devos certe perdi ĝin."

Tio estas la Racio, kiun iu kredofanatika Lutero same krude kiel profane insultis "putino de l'diablo" ("Teufelshure"). La puno kiun Kantio anoncis, nome perdo de la spiritolibero, ne forrestis ; la granda genia reformanto restis kaptita en diablo-kredo. Li deklaris en biblie dogma kateniteco: "Mi ne toleras kompaton por tiuj sorĉistinoj ; mi deziras ke oni forbruligu ilin unu post la alia." Kaj li nomis Kopernikon "farsulo", "kiu renversas la astronomion", tial ke, male al Josuo, kiu ja diris : "Suno, haltu" li, Koperniko, pruvis ke la suno estas senmova kaj la tero turniĝas, anstataŭ inverse. Tiel okazas kie la kredo klopodas sklavigi la racion, la liberan pensadon.

La libera pensado ne konas alian kriterion ol tiun



puran racion ; ĝi sola konigas al ni la eternan kriterion de l'vero por nia pensado, la kriterion de l'belo por nia sento kaj la kriterion de l'bono, la kriterion de l'amo kaj justo por nia volado kaj nia etiko. Ĝi estas la fonto mem de l'kriterioj de vero kaj iluzio, de l'kono de bono kaj malbono, el kiu ni pensas kaj ekzamenas, juĝas kaj prijuĝas. Ĝi ne postulas pridubindan, neracian kredon, sed donas al ni neskueblan, racian certecon, la firmecon kaj solidecon, la profundan grundon sur kiu ni staras en la lumo de l'eterneco.

Pensa leĝo kaj morala leĝo de la racio havas nenion komunan kun Dio aŭ ordono, kun volo aŭ arbitro. Same kiel dia volo aŭ homa volo ne povus kaŭzi ke duoble du ne estus kvar, tiel same ĝi ne povus kaŭzi ke neracia, partieca egoismo ne estus malbona kaj kondamninda kaj ke honesto, amo, justo ne estus noblaj kaj bonaj en si mem.

Kiel ne ekzistas kristana aŭ pagana logiko, tiel ankaŭ ne ekzistas kristanaj aŭ paganaj honesto, virto, amo, justo. Ekzistas nur unu eterna, racia, ĝenerale homa logiko, kaj ekzistas nur unu eterna, racia, ĝenerale homa honesto, virto, amo, justo. Kaj kiel la logiko estas afero de la **prudento,** sendependa de kredo aŭ nekredo, tiel same honesto, amo, justo estas aferoj de la **koro,** de **karaktero,** de **inklinado,** sendependaj de kredo aŭ nekredo.

Unu gramo da karaktero pezas pli multe en la pesilo de l'moraleco ol mil funtoj da kredo.

La kredantoj disputas pri la demando ĉu la kredo beatigas aŭ la laboroj, sed mi diras al vi : ve al ĉia egoisma zorgado por propraj animo kaj beateco. **Moraleco** ne estas afero de kredo nek de laboroj, kiuj estas nenio kaj vantaj sen la pura, neprofitema, servema **amo,** levita super ĉia kredo aŭ nekredo. Ja, "se mi parolus la lingvojn de la homoj kaj de la anĝeloj, kaj mi ne havus la amon, mi estus tintanta metalo aŭ sonanta sonorilo... kaj se mi havus **la tutan kredon,** tiel ke mi movus montojn, **kaj ne havus la amon,** mi estus **nenio."** (I Korintanoj XIII 1, 2).

Do amo ne estas afero de kredo aŭ nekredo, sed de karaktero. Oni parolas pri karitataj fratinoj. Ve, se ili estas nur kredofratinoj! Ĉu vi deziras scii kion vi morale valoras ? Demandu al vi kion vi farus, kiel vi aranĝus vian vivon, se vi estus absolute nekreda,se vi vivus en plena certeco de la liberpensulo ke ne ĉiovida okulo vin vidas, ke ĉiopova pekovenĝanto kaj virtorekompencanto kaj repaganta postmorta mondo estas moralfalsantaj elpensaĵoj de l'homo, ke do neniam puno pro via peko, se ne paroli pri ia "rekompenco" por via virto, atendas vin... Kaj kio **tiam** estus via viv-elekto, via libera **prefero** : honesto aŭ trompo, pureco aŭ malĉasto ; kion vi tiam volus oferi por via proksimulo por ties bono mem, ne por via propra bono aŭ pro dio. La respondo al tiu demando decidas pri via morala valoro aŭ nevaloro, via digno en la lumo de l'eterneco.

Eĉ se ĉiopova diablo regus la mondon, kiu damnus nin pro niaj virtoj kaj beatigus nin pro niaj pekoj, karaktero restus karaktero, justo restus justo, trompo restus malestiminda kaj honesteco devo. Tiom absolute moraleco sendependas de kredo. Ne ekzistas paganaj **aŭ** kristanaj **aŭ** judaj **kredo-virtoj** - nur paganaj **kaj** kristanaj **kaj** judaj **ĝenerale homaj karakteraj virtoj.** Kaj ĉiuj sanktaj kredovirtoj, t.e. virtoj kiuj plene dependas de la kredo, estas nenio krom **ŝajne** sanktaj, hipokritaj brilaj pekoj.

La religio povas nek tuŝi la eternan kriterion de vero kaj moraleco de ni ĉiuj, nek povas ŝanĝi ies veran karakteron, lian internan honeston aŭ la gradon de lia vera oferemo. Ĝi do ne povas plibonigi kiun ajn, sed feliĉe ankaŭ ne povas igi iun malpli bona ol li aŭ ŝi estas laŭ sia karaktero. Tiel la religio el si mem liveras nur **surogaton** de moraleco kaj etiko.

La varo de la 1001 religioj estas nepura. Ĝi ja ĉiam estas miksaĵo plena de ekstermoralaj, se ne malmoralaj, elementoj, kiel sento de dependeco de persona ĉiopovo, timo de kolero aŭ puno, espero je bonvolo aŭ rekompenco kaj, ĝenerale, heteronomia



ordonmoralo anstataŭ aŭtonomia karaktermoralo. Kio estas eĉ pli malbona : la religioj plenas de amorala kaj malmorala kredo je ekzorco kaj elpetego kiu falsas la konsciencon per tiaj morale senvaloraj religio-"devoj" kiel ritaj "pureco" kaj "malpureco", uzado de "sakramentoj" ktp., ktp. Ke ĉiu el tiuj multnombraj religioj rekomendas sian propran miksaĵon kiel superan, kiel ekskluzive beatigan, kiel la veran ŝlosilon al la pordegoj de l'beateco, tio estas memkomprenebla. Sed la liberpensulo ridetas en silento kiam ili ŝajnigas siajn surogat-produktojn kiel la ununuran veran naturan buteron, kiel la solan veran nefalsitan moralecon kaj etikon. Kun la kredanta angla poeto Pope ni diras :

> Furiozu pro l'vera kredo la batalo zelotara,
> la vero apartenas al kiu vivas laù just' kaj
> racio klara.

Kaj la disfenda karaktero de la religioj, kiu dividas la infanojn jam en la lernejoj laŭ diversaj kalvinismaj sektoj, laŭ romkatolika, luterana, juda kaj pagana, kiu sankcias la kastohonton kun ties sanktaj Bram-anoj kaj ties malpurigaj parioj, kaj kiu malpermesas geedziĝon kaj amon super prokreda dividiĝo kiel la "kanceron" de la "miksedziĝo", tiun disfendan karakteron povas elimini nenio en la mondo krom la sunbrilo de la natura racieco kaj moraleco. Tiu sunbrilo foje-foje ekaperas por momento ĉe la judaj profetoj, ĉe Lao-Ce kaj Budho, en la Talmudo kaj la Nova Testamento kaj traradias la instruon de Spinozo kaj Kantio.

Tio kion mi celas estas la konscio ke la unusola vera "religio" estus la pura, natura, ĝenerale homa moraleco, do nenio krom amo kaj justo, kaj ke ĉiuj aliaj kredopraktikoj, ne nur la sangaj aŭtodafeoj (t.e. "agoj de l'kredo"!), sed ankaŭ ĉiuj oferoj kaj preĝoj kaj devotaĵoj kaj ritoj, bapto, cirkumcido, manĝoleĝo kaj sankta manĝo povas nomiĝi nur "ŝajnoservo", "religia halucino", por paroli kun Kantio; aŭ, laŭ Spinozo : nur "superstiĉo".

Tio kion mi celas estas la Talmuda vorto (Sab. 31b) : "Amu vian proksimulon kiel vin mem, **tio estas la tuta instruo** ; ĉio alia estas nur ekzegezo"

(kaj, ni aldonas : rabena falsado). Kaj la sama penso ĉe Mateo VII, 12 : "Do ĉiujn aĵojn kiujn vi volas ke la homoj faru al vi, vi faru ankaŭ al ili, **ĉar tio** estas la Leĝo kaj la Profetoj". Aŭ eĉ pli koncize per la vorto de "Paŭlo" : "Amo estas la plenumiĝo de la Leĝo". Kaj samsence Kantio diras : "La mallarĝa pordego kaj la mallarĝa vojo kiuj kondukas al la vivo", **jen la bona vivkonduto.** Kaj "la larĝa pordego kaj la larĝa vojo kiuj kondukas al pereo kaj laŭ kiuj multaj iras", **jen la eklezio.**

La eklezio ? Sed ĉu vi do ne vidas la lumon brili el Stokholmo, mi aŭdas vin diri, la grandan "movadon por unueco de la eklezioj"? (*)

Vere, mi vidas ke estas sole kristanaj eklezioj kaj ke la romkatolika eklezio ne partoprenas, ĉar laŭ la Tezaro (Tezo 18) ja estu malbenita tiu kiu rigardas la protestantismon kiel formon de la "vera" kristanismo en kiu oni povus "plaĉi" al Dio same multe kiel en la roma eklezio. Ne, la nuro en kiu ĉiuj eklezioj de la mondo trovas sian unuecon estas kaj restos la semado de dividiĝo en la mondo. Ili ĉiuj predikas la amon (kompreneble, tiom kiom ili estas raciaj) kaj ĉiuj semas la malamon (malgraŭ si mem, tiom kiom ili estas heteronomiaj). Kaj la nura vera unueca eklezio estos la "eklezio" postulatita de nia nobla filozofo Heymans : "Senreligia eklezio de la Idealo estas, kaj historie kaj logike, la postulo de l'estonteco".

Kiel tranĉe ĝusta estas la vorto de Weber : "Kaino mortbatis sian fraton Habelo ĉe la ofero ; trista antaŭsigno de la abomeninda mizero kiu devis rezulti el la diferencaj manieroj de oferado ĉi tie surtere". Ĉe la limo de la protestanta Ulstero en Irlando kaj la romkatolikaj distriktoj protestantoj kaj romkatolikoj estas senpardonaj malamikoj. Same amare kiel prave unu el tiuj limloĝantoj diris : "Se ni estus ateistoj, ni vivus unu kun la alia en paco kaj amikeco ; sed nun kiam ni estas kristanoj, ni vivas kiel kato kun hundo".

-----------------

(*) En 1925 oni en Stokholmo okazigis internacian konferencon de protestantaj eklezioj sub gvidado de Söderblom, ĉefepiskopo de Upsalo kaj primaso de la sveda eklezio. Tiu konferenco strebis al unueco. (noto de l'trad.).



Tiel la pli kaj pli dissplitiĝantaj eklezioj kaj konfesioj restas la eternaj fendantoj de l'homaro kaj restas la komuna racio de ni ĉiuj, kun sia unusola senkreda racio-instruo kaj sia ununura senkreda etiko, la eterna fonto de nia **unueco super prokreda dividiĝo.** Voltero pravas, dirante : "La kredo ĉiam klopodis fari la mondon neloĝebla por alipensantoj. Ĝi spirite kaj korpe mortigis sennombrajn milionojn; nek la amo nek la racio estus difektinta al ili eĉ nur unu haron." Oni ripetadas ĝistede : la kredo beatigas kaj la amo blindigas. Ni kune konsciu : la amo beatigas kaj la kredo blindigas.

Mi finu per parabolo, prenita el Genezo XI, la turkonstruado de Babelo. La **kredo,** kiel ni vidis, estas la fonto de nia plej profunda dividiĝo ; la **racio** estas la fonto de nia plej profunda unueco. Sub gvidado de la racio ni, laŭ la rava vorto de Spinozo, dezirus nenion por ni mem kion ni ne dezirus por ĉiu alia ; ni estus justaj, fidelaj kaj honestaj. Kaj la homaro estus unu popolo kun unu komuna celo, unu komuna spirita lingvo kaj unu animo. Sed la Dio de l'skriboj dispoziciis alimaniere. Nur aŭskultu nian Genezan rakonton: "La tuta tero havis unu lingvon kaj la samajn vortojn... kaj ili diris unu al la alia : Venu, ni konstruu al ni urbon kun turo kies pinto atingas ĝis en la ĉielo... por ke ni ne disŝutiĝu tra la tuta mondo. Sed Javeo descendis por rigardi la urbon kaj la turon kiujn la homoj jam konstruis kaj diris : 'Jen, ili formas unu popolon kaj ĉiuj havas la saman lingvon. Tio ĉi estas nur la komenco de tio kion ili faros ; nun ili povos realigi ĉiujn siajn planojn senĝene. Ni do descendu kaj tie konfuzu ilian lingvon, tiel ke ili ne komprenos unu la alian.' Tiel la Sinjoro disŝutis ilin de tie tra la tuta mondo kaj ili ĉesis konstrui la urbon." Kaj tiel restis ĝis la nuna tago.

Sed ek do ĉiuj ni, ek al batalo kontraŭ tiu malamika potenco, kiu rompas nian unuecon, kiu frakasas nian komunaĵon kaj niajn plej altajn packonstruojn; kiu humiligas kaj dispelas kaj konfuzas nin, tiel ke ni ne plu komprenas nian komunan lingvon!

For el la mallumo de l'preĝejoj kaj karceroj, kiuj katenas kaj konfuzas la spiriton kaj disŝiras la mondon, kaj eksteren, en la torenton da lumo de la ununura, vere universala, por ĉiuj brilanta Suno de la Libera Penso.

Suno de l'racio, suno de l'amo, suno de l'justeco, **illustra nos,** trabrilu nian koron kaj liberigu nin de l'malbono, de la Babela lingvokonfuzo de l'kredo, por ke en via sankta lumo ni konkorde rekonstruu la urbon kaj la turon de l'homaro !

Klarigo de kelkaj propraj nomoj kaj nocioj kiuj ne troviĝas en Plena Ilustrita Vortaro (PIV), aŭ en ĉi tiu teksto estas uzitaj kun diferenca signifo.

------------------------------

**Heymans, Gerard** (Hejmans Ĥerard) 1857-1930 ; nederlanda filozofo kaj psikologo. Laŭ H. ne la agoj de l'homo estas objekto de moralaj prijuĝoj, sed la karaktero sur kiu baziĝas tiuj agoj.

**Weber, Max** (Veber Maks) 1864-1920 ; germana sociologo kaj historiisto ; unu el la plej grandaj figuroj el la historio de l'sociaj sciencoj.

**Aŭtonomio,** la karakteriza eco de moralsistemo laŭ kiu la homo ekzamenas kaj (pri)juĝas sendepende de ekstera aŭtoritato. La homo ja devus obei nur bonan aŭtoritaton, do tiun obeadon necese devas antaŭi lia propra, memstara prijuĝo. Kp.: heteronomio.

**Heteronomio,** karakteriza eco de moralsistemo kiu serĉas la aŭtoritaton de siaj instruoj ne en la homo sed ekster li, ekz. en eklezio kaj ŝtato. Tiele la sekvenda konduto estas preskribata laŭ diaj aŭ sociaj ordonoj. Kp.:aŭtonomio.

*****************************************************

Directeur de publication & imprimeur
Christian Baudé, F 47340 Laroque Timbaut

Nia debato :

# laboro, sendungeco, rajto je pigro

**Kribo:**
La titolo mem de tiu debato estas jam enkonduko per si mem. Sed mi venku mian naturan...pigron, kaj aldonu kelkajn ideojn, eĉ se ne tre originalajn.

* La naturaj bezonoj konsumi por pluvivi, por pli bone vivi, trudas al la homaro unue kolekti, ĉasi, poste semi, bredi, kaj nun industrie produkti. La emoj al arto kaj kulturo povis manifestiĝi, tuj kiam homoj povis anticipi la venontajn bezonojn kaj akumuli kvazaŭ provizon da "libertempo" per stoko da manĝaĵoj, per sekura ŝirmejo. La emo al scio, al pigro, la superregemo, kondukis al kiel eble plej efika laboro (iloj, maŝinoj, aŭtomatigo, informadiko...) kaj al la fifama "kapitalisma socio bazita sur profito", por denove gurdi la ŝablonon.

* La regado de profitsocio en ĉiuj mondpartoj signas la nunan situacion de la homaro sur nia eta kosmero. Paradokse, en tia socio povas ricevi enspezon nur tiu, kiu laboras aŭ laboris, aŭ laborigis aliulojn. Relative freŝdata tendenco estas garantii iom da aĉetpovo al senlaboruloj, eĉ al tiuj, kiuj ankoraŭ ne eklaboris. Sed senĉese malpliiĝas la kvanto da laboro farenda de homoj. Kreskas do la kvanto da disponeblaj varoj en iuj landoj, dum paralele malkreskas la suma kvanto da aĉetpovo disdonata en tiuj landoj, kaj malsatas en aliaj landoj homoj kondamnitaj pigri.



Statistiko por Francio ekzemple indikas, ke, eĉ se ne kreskas la jara produktado, la produktiveco forigas ĉiujare de 3 ĝis 4% el la oficoj. Krome, en tiu sama mondparto la ĉiujara diferenco inter la nombro da gejunuloj aperantaj sur

la labormerkato kaj la nombro da emeritoj estas minimume 200 000.

* Kiajn solvojn trovi ? Ĉu eblas ion fari en la kadro de la nuna sistemo? Aŭ ĉu endas ŝanĝi abrupte la tutan sistemon? Ĉu ŝtatisma solvo bolŝevikeca? Ĉu francmaniera "socialismo"? (mi petas vin ne tro ridaĉi...) Aŭ fuĝe rifuĝi en... utopion?

* La utopio estas ja "socio nebazita sur profito", alia ŝablono, certe. Eĉ seriozuloj aludas pri tio! Kaj ankoraŭ pli seriozaj uloj kredis realigi tion en iuj orientaj landoj, kiuj nun importas tritikon el... kapitalismaj landoj. Tio ne senkuraĝigas Mitterrand en Francio, sed ĉiufoje kiam oni volas malpliigi la nombron da senlaboruloj, oni atencas la profiton, kio misfunkciigas la ekonomion... kaj naskas sendungiĝon, do senlaborulojn, kiujn necesas tamen manĝigi, prenante iom da mono al tiuj, kiuj "bonŝance" konservas sian oficon, ktp, ktp, ĉiu nun scias la rekantaĵon.

Tamen, imagu :
produkti laŭ la realaj bezonoj, ne laŭ la profitamo;
forigi senutilajn aŭ malutilajn produktadojn;
...ĉu tio vere ne eblus?
- Eble jes, sed tiam ege malpliiĝus la necesa laborkvanto. Ĉu tiam nepre doni laboron al ĉiu?
Iuj opinias NE : nur ĉiu fakulo nepre necesa al la produktado havu laboron, ne la aliaj. Tiuj ricevu minimuman garantiatan enspezon. Ha, fulmotondro, kia pigrego! Aliaj opinias JES : ĉiu mallonge laboru, kaj disponu multe pli da libertempo por disvolvi sian personecon, amori, ktp! Mi mem, eterna farsulo, opinias, ke en tiu utopio laboru tiuj, kiuj emas labori, laŭ sia emo kaj talento, pli-malpli longe laŭ la individuoj, kaj la pigruloj pigru laŭplaĉe.
Nun multaj pigruloj devige laboras, kaj fuŝe laboras pro manko de entuziasmo. Aliflanke, multaj avidas laboron, kaj eĉ maldormus, se ili povus enspezi pli per nokta laboro... Ni lasu ĉiun agi-neagi laŭplaĉe. Ĉu feliĉo venos? Eble, se ĉiel pleniĝos la telero.

***Lilia :***
*Strange kaj interese : la dutermon oni lokas ĝuste ĉe la rilato socio/individuo. Tamen, oni ne sufiĉe meditas pri la fakto, ke tiu interrilata aspekto konstituas nur sub-aron de pli vasta temo, nome la influoj de geografio kaj lokaj kutimoj sur la individuojn de ĉiu aparta socio...*

*Ĝenerale, nordaj popoloj lamentas : "Ve! kun tiuj longaj malvarmaj sezonoj oni malviglig̑as mense kaj korpe, oni emas vintri kiel ursoj... Eĉ la barbo sur la vangoj malrapidigas sian kreskadon! Ha, se brilus ĉiam la suno, oni sentus sian energion boli en la vejnoj, oni ja estus pelata aktivi, fari multe pli...!"*

*Male, ĉe la suda hemisfero aŭdiĝas vortoj tiaj : "Diable, ĉiam tiu sufoka varmo, kiu estigas kvazaŭ kronikan lacon kuraceblan nur per vagado por kulti la sunradiojn aŭ sklaviĝo al serĉo de freŝaj lokoj...Hm! kiel bone stari ĉe la stovejo kun bona taso da fumanta teo dum ekstere falas la neĝo, kaj povi verki, studi, legi dum horoj, tagon post la alia..."*

*Ĉu la nomadoj kaj ĉu la gentoj, kiuj nur rikoltas kaj predas siajn nutraĵojn estas malpli laboremaj, pli pigraj ol la popoloj, kiuj dumvive plantas kaj laboras sur sia terpeco por akiri siajn vivrimedojn? Ĉu tio ne estas simple (kaj komplike...) demando pri klimato, pri natura medio ĉirkaŭa, pri tipoj de akiritaj sociaj aktivecoj?*

*Ni lasu la parolon al antropologoj... aŭ al tiuj, kiuj ĝuas moderajn klimatojn kaj ne mortas de laborekscesoj - kaj tiel povas permesi al si esti sufiĉe malpigraj por plu studi iomete tiun aspekton!*

**Garolo :**
Kara Kribo, en tiu prezentado de via 16a ĉenletero vi montris la temon tiom objektive, ke mi praktike havas nenion por debati aŭ rebati, kaj ĉiu punkto (laboro, sendungeco kaj pigro) meritus sian propran ĉapitron. Tamen la interligiteco estas granda kaj unu punkto dependas de la alia. Do, jen mia opinio.

Nedubeble, la naturaj bezonoj de la homoj kondukas al la laboro, tio estas al aktivado de la homoj, ĉefe en la naturo, por ke tiuj homoj havigu al si vivrimedojn. Sendube, tio estas fakto ne refutebla. Per sia intelekta kapablo la homo provis produkti pli da varoj, manĝaĵoj kaj pliaj bezonkontentigaĵoj, malpligravigante siajn fortostreĉojn. La homo kreis la laborilojn, la maŝinojn, la robotojn kaj la komputilojn, kiuj ankaŭ celas helpi la homan menson. Fakte, kiam oni parolas pri laboro,

oni ne devas forgesi, ke la mensa laboro estas plejofte pli grava ol la laboro devenanta de fizika korpa forto. Sendepende de la fonto de la homa laboro, per menso, per brakoj helpe de maŝinoj, komputiloj kaj ĉiaj ajn helpaj rimedoj, evidentas, ke la laboro home nur konstruas kaj edifas, eĉ kiam temas pri detruo : la laboro estas la nura, la sola, aŭtentika kapitalo je la dispono de la homaro. Ĉiuj pliaj interpretoj pri kapitalo fontas el homa spekulado, kiu ja kondukis al la fama "kapitalismo", kiun ni ĉiuj tiel vigle kondamnas... sen tre bone scii kial! Mi diras tion, ĉar ĝuste tie aperas...la pigro (mallaboremo) kaj la sendungeco, tiu stulta konsekvenco de la sistemo, en kiu ni troviĝas ; aperas la individuaj, privataj kapitalismoj, kaj la kolektivaj, ŝtataj kapitalismoj... Kaj, strange, iun lastan formon de ŝtatkapitalismo oni nomas... socialismo aŭ komunismo! Fakte, oni jam de longe devus nomi tion : Pigrismo.

La socialismo, la komunismo (bonvolu akcepti la novan difinon : Pigrismo) ja de longe preterpasis la stadion de "rajto je pigro" ; ĝi ne plu estas simpla aplikado de rajto, ĝi atingis stadion de sistema, instituciigita funkciado en ĝenerala pigrado!... kompreneble laŭ leĝaj sistemigadoj, kie ni, azenaj popolanoj, balotas, ĉar fakte de longe ni ĉiuj mem provas anstataŭigi la laboron per la pigro. Bela evoluo, ĉu ne? Kaj oni ankoraŭ kuraĝas paroli pri ekspluatado de la homo fare de la homo, oni ankoraŭ klasbatalas...

Laŭ mi, fakte ankoraŭ ekzistas tri klasoj : la laboremuloj (preskaŭ fin-memekstermintaj sin), la sendunguloj (kiuj jam ricevis la mikrobojn de mallaboremo, sed ne atingis lertecon de vera pigreco) kaj la lertaj pigruloj (ankaŭ la parazitoj) el ĉiuspecaj devenoj, ekde la paperaĉuloj ĝis la "produktivaj" militistoj, kiuj ja defendas nian patrion, ĝis tuttera eksplodigo, se bezone!

Miaj vortoj tute ne atingis malseriozecon, ĉar jen oni parolas pri "rajto je pigro"... Kial ne pri "devo je laboro"? De pli ol 30 jaroj, ĉiumomente oni lacigas niajn orelojn, en mitingoj, en manifestacioj, en strikoj, en kolektivaj agadoj, en senfinaj subskriboj pri la "homaj rajtoj". Kial oni tute ne parolas pri la aŭtentikaj, individuaj "homaj devoj"? Nia "homa devo" tute ne estas pagi imposton por vivigi la pigrulojn, tute ne estas nur mallongigi la laborsemajnon pro pigremo ; nia vera "homa devo" estus atingi nian homan memstarecon, nian homan dignon ne per kolektiva pigreco sed per individua laboro. Nia homa devo estas ne lasi nin ekspluati kompreneble de fikapitalisto privata, de alia servuta aparateco, sed ankaŭ ne de kolektiva sistemo, kiu nur promocias la pigrecon, ĉar ni daŭre pensas pri niaj "rajtoj" kaj forgesas niajn "devojn" de homo kiel individuo.

En ĉi tiun titolon mem Kribo enmetis la vorton : sendungeco. Kial ne la vorton : senlaboreco? Ja de longe la homoj ne plu klopodas por laboro sed nur por dungo... tio estas, ili strebas al la salajro, al la lukro, laŭeble for de ĉia ajn laboro. La paraziteco regas : nekredeble, ke malpli ol 20 procentoj el dungitaj homoj laboras por produkti ion, kiu kapablas efektive utili por la kontentigo de homaj veraj bezonoj!

Jes, tute feliĉe la produktiveco bonege kreskas ĉe la "individua kapitalisma" sistemo. Tiel la sistemo mem ĵetas pli kaj pli da ekslaboristoj al pigra parazita vivo, kaj ĉiuj atendas solvon de la sistemo, en ridinda absurda pigremo. La miriga afero estas, ke ankoraŭ estas homoj, kiuj atendas la solvon el ŝtatkapitalismo, el komunismo, el ŝtatpigrismo. Ja la fama produktiveco, en komunismo-sistemo, ĝuste tendencas malkreski; kaj, fakte, la sovetiaj komunistaj "kamaradoj" senhonte manĝas panon el "kapitalisma imperiismo"-faruno, kvankam pli ol 42 procentoj de la sovetia laborforto pigre gapas en agrikulturaj grundoj en plena dungeco... Kio konfirmas, ke dungeco, laboro kaj produktiveco havas tre malproksimajn rilatojn. Per kapitalisma okcidenta laboro ĉiu hektaro el malbona grundo produktas 4 tunojn da grenoj; en komunisma orienta dungado, kiu ja forigis la sendungecon, ĉiu hektaro el bona grundo donas apenaŭ unu tunon da grenoj.

Ĉu ne ridaĉi pri "socialismo" laŭ franca stilo? Finfine, kio estas "socialismo" - aŭ tute simple ĉiuj ŝtatsistemoj (ankaŭ la brazilia diktatoreca ŝtatsistemo), kiuj celas doni solvojn por kolektivaj agadoj? Tiuj socialismoj aŭ ŝtatismoj devus nomiĝi "Flikismo". Ĉiuj tiuj leĝdekretoj, kiuj pretendas fiksi prezojn, protekti naciajn ekonomiojn, kontroli produktadon, distribui rimedojn kaj daŭre pligravigi la impostojn, ktp, ktp, rememorigas al mi flikadon. La sistemo (ankaŭ la vera socialismo) estas kiel malnova vestaĵo : oni flikas en unu flanko,

ĝi ŝiriĝas en alia flanko, oni ŝtopas unu truon en unu direkto, du, tri, dek truoj tuj aperas en la alia parto... Ja ne estas solvo, en flikismo.

La solvo sendube kuŝas ĉe la homo kiel individuo, kiel memstara ento, kiu per sia kapablo, per sia laboro, la vera kapitalo, kuraĝu konstrui memstare sian vivon, kuraĝu plenigi sian propran teleron, sendepende de la aliaj homoj, de la komunumo, de la kolektivo. Tiam, certas mi, senlaboreco estos for kaj la homo "rajtos" kaj eĉ "devos" pigri... post la laboro, kompreneble.

***Suzanne :***
*La homo fieras pri sia menskapableco, kiu, ja, ebligis mirindajn kreaĵojn ; sed, laŭ ia vidpunkto, li estas malpli inteligenta ol la animalo. Ekzemple, la kato. Jen besto, kiu ĝuas la pigron, la vivon. Longajn horojn ĝi estas revema. Revi ne estas malvirto, tute male. Mi ĵus aŭskultis radiofonian dissendon* "Ecole des parents et des éducateurs" *(Lernejo de gepatroj kaj edukistoj) : "Kiam gepatroj, ĉefe la patrino, dum la libertago vidas sian infanon senokupa, eĉ neludanta, ili erare opinias, ke revi neniel profitdonas. Tiam, ili petas lin, sin okupi, almenaŭ per ludo. Do, la plimulto ne metas tiun demandon : Kial la homo estu kondamnata, sian tutan vivon, plenumi saman laboron, stultan kaj danĝeran, kiam teknike eblas pli bone vivi la nunon?*
*En la nuntempa krizo oni traktas nur la ekonomian flankon, dum la laborkondiĉojn oni ignoras. Nun eblus ekstraktadi karbon per aŭtomata maŝino, kun televizia kamerao, kiu informus pri la farita laboro la ministojn, kiuj regus la karbekstraktadon de malproksime, kaj ne endanĝerigus sian sanon, sian vivon.*
*Sed, same kiel por ĉiuj aferoj utilaj al la popolo, tia teknologio "postulus grandegan elspezon". Kompreneble, por iaj veturrimedoj, kiujn neniam la plimultaj civitanoj uzos, la elspezegoj tute negravas! Ni ne parolu pri la armeo, la armiloj, la disaj militoj, kiuj buĉas junulojn, dum la samaj regantoj asertas, ke en la populacio mankas junaj homoj!*
*La dissendoj de radio "France-Culture" plejparte temas pri homoj, kiuj havis la bonŝancon ricevi la scion kaj la kulturon, kaj plenumas sian deziratan okupiĝon : muzikon, pentrarton, teatron, literaturon, ĉu sian tutan tempon, ĉu kune kun profesia ofico,* **laboro**, *kiu aŭ helpas ilin tion realigi, aŭ ne forrabas ilian tutan tempon, dum ili sufiĉe perlaboras.*



*Aliaj amas trairi Saharon kaj similajn regionojn per, ekzemple, speciala veturilo kia velĉaro. Mi ĵus aŭskultis pri velĉara veturado tra Saharo, kiun la kreinto de tia veturilo entreprenis dum sia jara libertempo (li laboras ĉe Televizio). Ili ne nur realigas sian deziron, sed ofte ilia profesia laboro estas agrabla kaj plaĉas al ili ; aŭ ili povas peti longan libertempon, ne riskante perdi sian oficon, kio estas neebla al multaj laboristoj. Estas ankaŭ tiuj, kiuj rondiras sur la oceanoj... eble tiuj devenas de alia klassocio. Ĉiel tia agrabla vivo estas malpermesata al la laboristoj. Pli kaj pli la kapitalistoj malrekte utiligas kaj utiligos la laikan instruadon por fortigi la klasdiferencojn de la lernantaro. Jam la kritikemon oni ne instruas. Kaj Savary (ministro pri edukado en Francio) revenigas tiun instruadon al la sama situacio kiel estis antaŭ unu jarcento...*

**Ĵansebo :**
- Kial ekzistas laboro?
- Por fari produktojn, utilajn kaj luksajn.
- Kio estas luksa produkto?
- Televidilo, aŭtomobilo.
- Aŭtomobilo estas utila!
- Nur ĝis la valoro de ordinara modelo. La cetero estas lukso.
- Per bela aŭto oni povas allogi virinojn.
- Ne estas nepra!
- Sed ofte pli facila!
- Sed se estus nur biciklo, tiu, kiu havus sur ĝi sonorilon, estus same kontenta kiel la nuna posedanto de luksa veturilo.
- Lukso estas do konkurenco inter la homoj klopodantaj por superi la aliajn. Bedaŭrinde, ili retroviĝas en la sama situacio kiel antaŭe.
- Certe. Sed estas ankaŭ homoj, kiuj scipovas ŝati belajn aferojn. Dank'al tiuj, ekzistas aŭtoj. Sed la konkurenco okazas ĉefe per pseŭdoluksaj produktoj por mezklasanoj.
- Se mi bone komprenas, la homoj luktas unu kontraŭ la alian por akiri produktojn neutilajn je socia skalo sed nepre necesajn je la individua : Ili bezonas ilin por socia konsidero.
- Tial ili devas laboregi por aĉeti tiujn necesegajn senutilaĵojn!
- Laŭ socia vidpunkto, estas tute stulte.
- Kial la estraro ne decidas trudi uzadon de bicikloj

por ĉesigi tiun malŝparon de energio?
- Tiel la homoj estus pli disponeblaj por la aliaj kaj do estus pli feliĉaj.
- Ĉu vi **vere** opinias, ke estraroj zorgas pri homfeliĉo?
- He...jes... kial ne?
- Ĉu vi opinias, ke oni ĵetas homojn en gulagojn aŭ en sendungecan mizeron por ilia feliĉo?
- Fakte ŝajnas, ke ne!
- Se oni rigardas la realon, oni konstatas, ke la diversaj ekonomiaj sistemoj havas komunan aspekton : ili fabrikas tiom da armiloj kaj tiom da strategiaj produktoj (fabrikmaŝinoj, avangardaj teknologioj...). Amaskonsumado estas nur duavica problemo. Ĝi povas ja aŭ ne ekzisti. Estas nur (ne nepra) rimedo , por laborigi la popolojn.
- Oni ne bezonas armilojn!
- Se lando havas riĉaĵojn, ĝi deziras ion por defendi ilin. Alikaze, alia lando prenas ilin perforte. Kaj oni rehavas la antaŭan problemon : nur la estraro estas malpli pacema.
- Se oni ne havus armilojn, tio ŝparigus multe da mono, uzebla por nutri aŭ sanigi la bezonantajn popolojn.
- Jes. Mondskale estas absurdaĵo. Landskale estas necesaĵo. Inter la ŝtatoj estas la sama konkurenco, kiel inter la homoj. Se lando ne havas armeon, ĝi tuj havos tiun de la najbaro.
- Kiel malaperigi tiun stultan konkurencon?
- Tio estas la problemo. Antaŭ ol malaperigi interŝtatan (aŭ interblokan) konkurencon, oni devas malaperigi la interhoman. Nur tiam la ŝtatoj povos havi pacon. Tiun tagon, la homoj scipovos agi por netuja profito.
- Ne estos facile.
- Certe ne! Vidu kiel estas facile lernigi Esperanton! Sed lerni ĝin estas rimedo por montri, ke oni estas preta fari aĵojn, individue senutilajn, sed favorajn al la mondpaco.
- Oferemuloj?
- Ne necesas sin oferi. Nur montri, ke oni bonvolas fari la unuan paŝon.
- Kaj pigremo?
- Nur tiam la homoj povos ripozi. Antaŭ tiam la ŝtatoj bezonos la homan laboron por senfina konkurenco!
- Kaj la maŝinoj?
- Ili donas pli da laboro, ol ili forigas da ĝi. La laboro estas nur alispeca...



PRIPENSOJ PRI

# ekonomikaj problemoj



(la unua parto aperis en L! 52)

***Praktike kiel agadi ?***

*La nura agado : respondeci, tio signifas memdecidi kaj firme postuli sian vivaspiron. Tion kostas la sukceso. Vera socialismo povas esti nek ŝtata, nek nacia, nek religia. La potenco de la kapitalismo (liberala aŭ ŝtata) estas nur nia plenpovo pasive cedita al niaj administrantoj aŭ niaj ekspluatistoj. Kio estus armeo sen soldatoj? fabriko sen laboristoj? ŝtata buĝeto sen impostdonantoj? Neniu povo ekzistas sen obeemuloj. Obei kontraŭ sia konscienco signifas akceli asistan socion. Memdecido kaj memadministrado ne povas konceptiĝi dum malfavoraj ekonomiaj kondiĉoj; reciproke ekonomia situacio ne povas pliboniĝi sen individua respondeco.*

*Memdecido pri kio? Ekzemple pri la ekzisto de la armeo, la plej malŝpariga institucio? Ĉu oni subtenas pasive? konscience? kontraŭvole? Oni eĉ ne kapablas tion precizigi, sed oni povas aserti, ke plej ofte mankas la informoj pri la ekonomiaj kaŭzoj de la milito. Se ne ĉiu kontraŭbatalas armeon, neniu deziras nuklean militon. Kiam oni konscias pri la rilato inter "krizo" kaj militemo, oni ne rajtas silenti.*

*Agi sen scii estas malkonscience*
*Scii sen agi estas malbrave*
*(Dominique PIRE)*

*Viktor HUGO skribis : "Se vi ne deziras militon, vi forigu armeon". Ĉefe armeo respondecas pri milito. Oni povas agi diversmaniere :*
*- rifuzi la militservon;*
*- ne labori en armilfabriko;*
*- ne impostpagi por armeo.*

Pri la unua agado la situacio certe evoluis dum la lastaj jardekoj. Hodiaŭ, en pluraj landoj, ni pli-malpli rajtas postuli la statuson de militrifuzanto. Tamen la batalo estas tro limiĝa je la rifuzo militservi; tio ne sufiĉas.

Rifuzi laboron, kiu utilas por armeo, ne estas tiel simple, ĉar en iuj regionoj oni povas elekti nur inter laboro por armilfabriko aŭ senlaboreco.

Ofte eĉ malfacilas koni la celon de sia laboro. La plej grandaj sindikatoj subtenas tian produktadon, pro tio ke armilfabrikado provizas salajron al kelkaj laboristoj. Granda eraro! Tiuj sindikatoj komplicas kun kapitalismo, la salajro de la armillaboristoj ebligas aĉeti aliajn utilajn varojn, kiuj ekzistas, eĉ se ili ne plu fabrikas armilojn. Do, forigi malutilan aŭ senutilan laboron ne signifas forigi la koncernan salajron. Nur parto de tiu salajro (ĉ. 20%) konsistanta en la armiloj venditaj eksterlanden estas ligita al la fabrikado. Fakte, ĉu ni rajtas gajni monon, vendante armilojn precipe al malriĉaj landoj? La neuzado de armiloj en la Tria Mondo ebligus unue ne elspezi por ripari la konsekvencojn de diversaj militoj, due destini tiun monon al pli rapida disvolviĝo, precipe al nutrado, alfabetiĝo kaj loĝado.

La tria agado ankoraŭ pli malfaciliĝas, ĉar mankas rimedoj por ne pagi la porarmean imposton. Tio signifas etendi la statuson de militserva rifuzanto al rifuzo de militfinancado.

Se la impostpagantoj povus elekti la destinon de sia mono (edukado, esplorado, Tria Mondo, transportoj...) ni tuj vetu, ke armado ne plu ricevus tiom da mono (16% de la ŝtata buĝeto en Francio). Ni alvokas milit-rifuzantojn, impostrifuzantojn, kontraŭmilitistojn, pacistojn, kune agi por mem elekti la destinon de la diversaj impostoj kaj taksoj, plia paŝo al memdecida organizo. Kiam la popolo estos sufiĉe informita pri la danĝereco de la atomarmiloj kaj pri la sentutileco de iu perarmila defendo, oni povos konstrui pli justan kaj pli amikecan socion.

***Ekonomia egaleco***

Salajro (kaj profito) reprezentas 2 trionojn de la nacia produkto. Tio signifas, ke ĉiu laboristo egalece ricevus monate proksimume 10 000 FF en Francio (inkluzive



de la profitoj, kompreneble). La nelaboristoj (infanoj, emeritoj, studentoj...) ricevus la restaĵon, t.e. 3 400FF monate. Se ni abolicius salajrecon, ĉiu ricevus monate 6 150 FF, t.e. la mezan enspezon por ĉiu homo, per egaleca disdono de la nacia produkto. Tiuj ciferoj proksimume similas por la aliaj industriaj landoj (Eŭropo, Oceanio, Nordameriko, Japanio...). Certe, plena egaleco neniam ekzistos.

Ankaŭ neegaleco malŝparigas monon, energion kaj labortempon, ĉar egaleca disdonado de la varoj malpli-kostigas la produktadon pro la kvanto, kaj ŝparas la luksan konsumadon.

Iuj kontraŭas egalecon, opiniante, ke necesas apartigi la diversajn kompetentojn per diversaj salajroj, ĉar studadoj multekostas kaj longedaŭras. Sed ne pagi la studentan laboron, tio ne estas justa. La laboristojn kompetentigas ne la diplomo, sed la profesia formiĝo, ĉefe rezervita al kadruloj, kiuj jam ricevas la plej altajn salajrojn, jam laboras en plej bonaj kondiĉoj, jam malpli riskas pro malsaniĝo kaj akcidentoj, jam havas pli interesan taskon, kaj havas pli longan esper-eblan vivon... Kial kompetenteco diferencigus la laboris-tojn pli ol penigeco aŭ danĝereco de la laboro? Kial per salajro? Kial ne per labordaŭro? Pri tio ni ĉiuj decidos.

Fakte, egala salajro estas nur paŝo al egaleco, ĉar kiuj ne laboras, tiuj ne ricevas saman enspezon. Abolicio de salajreco (egala enspezo) estas plia paŝo al egaleco. Utopio laŭ kelkaj, perfido laŭ aliaj. Ni sciu, ke ni eniras tian socion. Jam preskaŭ triono de la enspezoj ne plu estas ligita al iu laboro. Tio estas vera revolucio. La sociaj kromsalajroj valoris :

1% de la nacia produkto en 1913
5% ........................ en 1940
14% ........................ en 1950
20% ........................ en 1970
pli ol 25% ........................ hodiaŭ.

Pri tio kapitalismo pli progresas ol iuj sindikatoj!...

***Kiu sindikata agado? Kiu striko?***

Kion opinii pri striko? Se la impostkolektistoj ekstrikas, se doganistoj liberigas landlimojn, se konfliktoj haltigas armilfabrikadon, se aliaj perturbas la reklamsektoron,

se kasisto de vojimposto ne plu deziras ricevi monon, sen monpunisto ne plu protokolas, kaj kontrolisto ne plu laboras... des pli bone por ni, ĉar tiuj strikoj ŝparas energion kaj labortempon, ŝanĝante nek konsumadon nek nian liberon. Male, se leterportisto, panisto, instruisto aŭ busŝoforo decidas haltigi sian taskon, tio perturbas nian vivon, tiel ke ni forgesas la motivon de la laborhaltigo. La konflikto inter dunganto kaj laboristoj naskas alian pro la malplaĉo de la konsumanto aŭ uzanto. Tiuj ruinigaj konsekvencoj malebligas solidarecon inter produktanto kaj konsumanto kaj firmigas klasosocion. Tiuj strikoj ne tro ĝenas la firmestrojn, profitantajn de tio por vendi superproduktaĵon. Se kutima striko estas oportuna en neutila aŭ malutila sektoro, ĝi estas malpopulara koncerne utilan produktaĵon.

Male, striko konsistanta en senpaga disdono de varoj aŭ servoj ne nur kontentigas la bezonojn de la popolo, sed ankaŭ atakas kapitalisman profiton. Plie, la striko per senpaga disdono favoras la malcentralizon de decidoj, la partoprenon de la produktantoj-konsumantoj pri socia administrado de la vivrimedoj.

La striktaj leĝecanoj kontraŭas tiun kontraŭleĝan proprigon de la produktorimedoj por kontentigi la sociajn bezonojn. Ĉu ili forgesis kiamaniere la laboristoj akiris la rajton de striko (uzita antaŭ leĝigo), same pri militrifuzo, pri esprimlibero, pri abortorajto? Niaj rimedoj entenas nian celon. Ni ne atendu la bonvolon de la leĝistoj, kiuj leĝigas nur ekzistantajn faktojn. La sindikataj klopodoj de Solidarnoŝĉ kontraŭleĝas. Ĉu pro tio iliaj depostuloj pri esprimrajto estas malpravaj?

Striko per senpaga disdono estos leĝigita, kiam ĝi estos populare uzata. Revolucio konsistos en ĝeneraligo de tiaj klopodoj. Kiam ni memdecidos la produktadon, ni memdecidos la labordaŭron individue laŭ niaj bezonoj, ni memdecidos pri la ĝusta prezo (eventuale pri senpageco) de varoj.

ANTAŬEN !

La interesatoj, kiuj ŝatus rilati kun la aŭtoroj, cele al interŝanĝado de ideoj kaj kunagado, bonvolu noti jenan adreson :
T G V (Transport Gratuit des Voyageurs)
33, rue des Vignoles, F 75020 PARIS





# ĉies voĉo pri ĉio ajn

**Pri ekonomikaj problemoj**

Ni trovas sub tiu titolo tre diversajn ideojn pri multaj aferoj : krizo, inflacio, senlaboreco, armeo, kapitalismo, milito, tria mondo ktp sinsekve iras. Kaj mi estis multe interesita. Sed mi deziras aldoni rimarkon pri la tria mondo kaj precipe pri la du desegnoj de purigantoj de nia lando kaj de Konferenco Nordo-Sudo. En mia urbo, kie ĝis 1983 la urbestraro estis maldekstra, la purigantoj estas sufiĉe laborpagataj kaj ne estas enmigrintoj. Proksime de la suda konferencanto, mi proponas aldoni kelkajn dekduojn da malsatantaj infanoj. Certe tio ĉi ne pravigas tion! Ni devas lukti kontraŭ la ekspluatado de iu lando fare de alia, de iu individuo fare de alia.

Sed ni ne ĉiam povas bonkore helpi popolojn, kiuj deziras persiste daŭrigi kreskantan demografion. En nia lando, se ni ne plu ekspluatus niajn malnovajn koloniojn, ni povus nutri nur 30 milionojn da loĝantoj. Ĉu en multaj landoj, nuntempe plenkreskaj, sed kies loĝantaro duobliĝos en la dudek venontaj jaroj, oni povos nutri ĉiujn? Aŭ ĉu ni devos ricevi la pliaĵon ĉe ni?

Lastsemajne mi aŭdis en televida programo sudanan virinkuracistinon, vivantan en Francio, kiu klarigis, ke sudanaj junaj knabinoj devas esti klitortranĉitaj kaj sekskudritaj, eĉ kiam vivantaj en Parizo, ĉar tio estas moro en iliaj deven-landoj. Ĝis kie ni devos iri?

Paŭlo.

**Demokrata centralizismo**

En la komunistaj partioj regas "demokrata centralizismo". Tiu ismo donas al la estraro superpovon rilate la ordinarajn membrojn. La komunista partio nederlanda

kongresis lastan semajnfinon. Estis multaj disputoj pri la estonta enhavo de la parti-programo.
En la partio estas tri tendencoj : 1.La malnovaj marks-ist-leninistoj (stalinistoj) 2.La feministoj kaj 3.La (ŝvebaj) noviguloj. Ambaŭ lastaj intencas batali plue sen Marks. Marks ne plu estas la unuunura "Beatulo" por ili. La malnovaj komunistoj (nomitaj "horizontaluloj") deziras (plibone dirite "postulas"), ke Marks restu la direktanto. "Sen Marks, diris iu kongresvizitanto, ne ekzistas komunismo". Se li sin nomas "horizontalulo", lia horizonto estas tre krepuska. Li eble neniam aŭdis pri "liberecana komunismo".
La kongreso denove kunvenos sekvontan semajnfinon. Al ni tre interesas scii, kion ĝi naskos.

Anekdoto el la kongreso :
Iu vizitanto donis eksplikon pri la esprimo "demokrata centralizismo". Imagu! Membro de estraro de iu komunista partio staras sur tegmento de iu domo. Li kraĉas mal-supren sur la kapon de ordinara membro de la partio. Tiu krias : "Fulmotondro, ĉu vi freneziĝis?"
Kaj la estraro respondas : "Vi do rajtas kraĉi reen!"
-Vespido-

**Ĉu nia estonto estos Kantantaj Morgaŭoj?**

Nia samideano (kaj mia amika samurbano) Valo sendis al L! letereton pri "Politikista Memorkapablo". Li memorigas al ni, ke, antaŭ la balotbatalo, la francaj maldekstr-uloj prezentis leĝproponon por enkonduko de Esp-o en lernejajn programojn. Kiam sekvis la sukceso de la socialista grupo en la estraro, tio estis komplete forgesita!
Ankaŭ en la ekologiistaj asocioj, kie mi batalas, la sekvo estis tute sama. Mi ĉiam aŭdas pri neŝanĝita energi-politiko sensenca, pri perfida malestimo al komuna profito kontraŭ monintereso de atomenergia trusto, pri sekreto kaj malestimo al la civitanoj, ktp.
Sendube, tio tremigos miajn amikojn en mia loka grupo, kiuj neniam volas aŭdi iun parolon pri iu politika afero; tamen tio devas esti dirita. Kiam mi iras aĉeti viandon ĉe la viandisto, laŭ la peco kiun mi elektas, mi agas politike. Do, mi esperas, ke verdaj Esperantistoj batalos samflanke de verdaj Ekologiistoj, por esti pli multnombraj. Dekstruloj kaj Maldekstruloj tute similas. Nia sukceso estos en alia direkto. Ni devas difini ĝin kaj nin. Ĉu



la Zamenhofa Interna Ideo estis neŭtrala?
Mi ĵus eksciis, ke tute sama estas la problemo de la Kuracista Societo ("Ordre des Médecins") : kandidato Mitterrand promesis disrompi tiun postlasaĵon de dum-mondmilita diktatora tempo; sed poste nenion faris.
Paŭlo.

**FOR LA FRENEZULON (4)**

La papaga ripetado de miaj asertoj fare de kdo PMG ne konsistigas por mi rebaton. Ĝi nur permesis al mi antaŭanonci en alia n-ro de L! la senmankan demonstr-adon de Kdo PMG pri la cirklokvadraturo. Nu, tio okazis.
Mi esperis nur, ke Kdo PMG proponos propran originalan solvon, kiel decas al SAT-ano memstaranto, sed, por tiu superflua demonstrado, li bezonis pluki el sia iluzi-ista ĉapelo teorion de homo ekzistinta antaŭ 150 jaroj, pri kiu mi persone neniam aŭdis. Mi ja ne estas fakulo. Ĉu tiu persono vere ekzistis? Ĉu lia teorio estas prava, kvankam ne konforma al la postuloj de la problemo pri la cirklokvadraturo? Ne utilas respondi tiujn demand-ojn, ĉar pri tio tute ne temas.
En la unua "For la Frenezulon!" mi ne petis, ke oni demonstru al mi, kiel solvi la problemon pri la cirklo-kvadraturo, mi mem jam solvis ĝin, sed, male, ke oni demonstru al mi kial ĝi estas oficiale reputita nesolvebla.
La ĝenerala silentado, responde al mia peto, estis por mi sufiĉa pruvo, ke mi tuŝis al tabua temo, kaj la ŝajnrebatado de Kdo PMG nur pli reliefigis tiun tabuecon.
Denunci la tabuigadon de la Vero kaj la falsadon (do, la dogmigadon) de la instruado en publikaj kaj "apartaj" medioj, estis la ĉefa celo klare esprimita en mia unua artikolo.
Temis, kaj ĉiam temas, ja scii, kial de pluraj jarmiloj la problemo pri la cirklokvadraturo estas reputita nesolvebla, dum nura manlaboristo, helpe de nur man-laborista instruiteco, kapablas mem solvi ĝin, kaj, konsekvence : kial la fakuloj daŭre proklamas kaj instruas la malon?
Ne temas ĉi tie pri eksterlogikaj, mistikaj aŭ metafizi-kaj aferoj, sed pri rezonado kaj ciferoj facile kompren-eblaj, agnoskeblaj aŭ refuteblaj de ĉiu nefakulo.

Se iu el la fakuloj estus bonvoleme demonstrinta en L!, kial la problemo pri la cirklokvadraturo estas efektive nesolvebla, mi mem estus refutinta tiun aserton per la malkaŝa demonstrado de mia, laŭ mi, nerefutebla solvo. Sed...neniu respondis!!!
Do, ĉar mi ne estas Don Kiĥoto, mi povas nur cedi kaj mem silenti antaŭ tiu por mi signifoplena silentado de la "Ventomueliloj" respondę al mia peta voko.
Sed tiu nerespondemo de SAT-anoj memimplicas la demandon, al kiu mi mem vane spitas jam de pli ol dudek jaroj, kiel daŭre kaj prave sin konsideri konscia kaj aganta SAT-ano, perfidante la SAT-statuton per hipokrita silentado antaŭ tabuoj kaj dogmoj?
Bedaŭrindege, la kamufla ŝajnrebata fumnubo eligita de Kdo PMG sukcesis nek malvidigi nek forgesigi tiun demandon... almenaŭ al mi.

- Konklude, samlingve paroli ne sufiĉas por interkompreniĝi, interkonsenti kaj tial utile agadi.
- Tiucele, ankaŭ nepre necesas memvole sin direkti al Vero kaj al Justo.
- Kompreneble, ankaŭ eblas ne perturbi sian lulitecon per demandoj pri tiuj vortoj.
- Ĉu prave? Cu grave?
- BOF!!!
- Bof!!!
- bof!!!

Anonima B.G.D. (Eymet)

...........

Bravegon por P.M.G., kiu skribis pri nova maniero kalkuli PI kaj samtempe solvas cirklan kvadraturon. Mi diras "nova", ĉar mi neniam aŭdis pri tiu afero, kiu ekzistas de post 1836. Mi kontrolis per mia komputilo kiu donis por PI per tiu metodo : 3.14159195. Tio ŝajnas tre bona kvanto. Kaj la kvadrato havis kiel surfacon .997686471 de tiu de la cirklo. Dankon ankaŭ al L! pro tia interesa informo.

Paŭlo.

**Pri Pollando, Afganio, SS 20, ktp**

Bravegon (ankaŭ) por Jakelino, kiu volas manifestacii kontraŭ imperiismo de Sovetunio! Sed ĉu dum manifestacioj ni surhavos la insignojn de Solidarnoŝĉ? De longa tempo ni vidas tiajn insignojn sur la vestoj de niaj samlandanoj ; ni ĉiam aŭdas kaj vidas en televido informojn pri la fuŝegaĵoj de Rusoj tra la mondo. Certe tio estas tre vera!... Kiam nia televido informas nin



pri iu afero, ni ĉiam vidas Usonon kiel paciston, kaj Sovetunion kiel frenezulon. Ĉu tio ankoraŭ estas vera? Ĉu vi ne konas ankaŭ multajn Pollandojn kaj Afganiojn tra Centra kaj Suda Ameriko? Ĉu ĉio estas bela kaj blanka tra kapitalismaj landoj kaj samtempe malbela kaj nigra en socialismaj landoj?
Mi opinias, ke oficialaj organizoj jam sufiĉe propagandas en niaj kapitalismaj landoj kontraŭ "socialisma" etiko, eĉ kiam nia estraro estas "socialista", por ke ni samtempe boju. Mi proponas en tiuj aferoj, aŭ silenti, aŭ kritiki ambaŭ; sed nek surhavi Solidarnoŝĉ-insignojn, nek iri al la Ruĝa Placo por manifestacii. Tio estas la kialo de multaj forlasoj de SAT-anoj.

Paŭlo.

**Pri "Reagoj de franca porpaca aktivantino..."**

Memkompreneble, pacisto estu homo, kiu rifuzas ĉiun ajn militon, ĉiujn ajn armilojn el ĉiu ajn ŝtato, unuvorte rifuzas la armeon, kiu naskas militon.
Oni scias, ke ĉiuj ŝtatregantoj tendence informadas la popolojn, enlande sed ĉefe eksterlanden. Parenteze, jen kial oni ne agnoskas Esperanton, kaj eble, se iam ĝi estos agnoskita, tiam la popoloj ne rajtos ĝin lerni... Sur tiu kampo nenion enviu unu al la alia Usono kaj Sovetio. De longe mi scias, ke la sovetia revolucio deflankiĝis, ke ĝi estis fuŝita de iuj gvidintoj per mortigado, kiel ĉiam okazis, ho ve, en la homara historio! Estis Kronŝtado en 1921... kaj mi ĵus legis pri artefarita ĝismorta malsatego okazinta en la jaroj 1932-33 en Ukrajno. Tion ĉi-supran mi diras, por ke oni ne taksu min mensblindulo. Tial min ne ĝenas rimarkigi, ke Usono prizorgas sian militpotencon, strebas al mondregado, al la limigo de nuklea milito al Eŭropo, Persa Golfo, kiujn ĝi konsideras eblaj lokoj por militi. Pri raketoj : estas pli efikaj tiuj de submara ŝipo elĵetitaj. Tion scias Usono kaj verŝajne ankaŭ Sovetio ; sed la raketoj lokitaj en Eŭropo ŝirmos Usonon kontraŭ nuklea milito (eĉ kontraŭ nur konvencia milito). Ĉiu ajn oponado kontraŭ la usona politiko estas konsiderata kiel submetiĝo - konscia aŭ nekonscia - al la komunista bloko. Konklude : tiuj du potencaj ŝtatoj havas la samajn "kvalitojn" : Sovetio en Afganio ktp, Usono en Centra Ameriko kaj aliloke. Historiaj monstraĵoj okazas/okazis en ĉiuj landoj. Konsideri, kiel faras Usono, Sovetion kiel la nuran abomenindan ŝtaton, estas troigi.
Ni, maljunaj homoj, kiuj konas la rezultojn, la agadojn

de la Ligo de Nacioj, tute ne iluziiĝis, kiam, post la dua mondmilito, oni starigis similan organizon : sama fonto, sama celo ; nur la potencaj nacioj regas la organizon kaj nur iliaj vidpunktoj estas plenumitaj, ili subigas la nepotencajn naciojn... Vidu la ĵusan reagon de Usono kontraŭ UNO.
La Konferencoj por Malarmado estas teatraĵoj. Eĉ Helmut Schmidt diris : "Oni konvinku min antaŭ la fino de tiu ĉi jaro (83-a, verŝajne), ke la usonanoj serioze traktadas. Mi ankoraŭ ne estas konvinkita".
Estas rimarkinde, ke tiaj konferencoj kaj similaj arigas la estrojn en agrablaj, luksaj lokoj; la partoprenantoj gaje, mondume, travivas tiujn tagojn. La sorto de la homaro ne estas ilia ĉefa zorgo! Mi memoras fotografaĵon. Ĝi prezentis kunvenintojn de Ligo de Nacioj, inter ili estis Briand ; ĉiuj estis ĝojaj en monduma kunveno, en komfortaj salonegoj. Tio memorigas al mi ankaŭ la egajn komfortajn brakseĝojn, en Bruselo, en la sidejo de C.E.E. (Eŭropa Ekonomia Komunumo), kiuj taŭgus por komforte dormi.
Se la mondregantoj intencus lojale kaj efike trakti la problemojn, tiaj kunvenoj ne estus nepre necesaj. Dank'al la modernaj komunikiloj, la postulatajn grandajn elspezojn oni ŝparus kaj povus disdoni al la senlaboruloj, la malfeliĉaj homoj ktp. Ĉiel, tiuj ŝtatestroj estas nur marionetoj gvidataj de mondpotenco, kies nuraj motivoj estas ĝiaj profito kaj potenco.
Jakelino tre ŝatas kaj tre ofte uzas jenan esprimon pri Sovetio : ateisma ŝtato. Laŭ mi, ateismo en tiu lando ne estas tre grava motoro. Ĉiel, tiu lando, kiel la tuta mondo, suferas la Jezuitan Regadon. Tia regado ne estas bagatelaĵo! Des pli efika, ju pli hipokrita.

Suzanne.

### Pri Leo Polak

...Mi legis hieraŭ vespere la du broŝurojn de Leo Polak ("Unueco super prokreda dividiĝo" kaj "Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo", NdlR). Jen mia reago : ni pensas same, sed esprimas nian penson per malsamaj mitologioj. Tion, kion Leo Polak nomas "Racio" mi nomas "sankta spirito". Sed temas nur pri vorta diferenco. La mitologio de Leo Polak ne estas pli racia, ol la mia. Ekzemple, li supozas ke, se ĉiuj irlandanoj estus ateistoj anstataŭ kristanoj, ili amus unu la alian kaj vivus pace. La historio de la ateismaj ŝtatoj pruvas la malon. Antaŭ 1917, oni povis kredi, ke ateismo malaperigos la batalojn pro ideologioj. Nu, en 1931 Leo Polak devus scii, ke Stalino malamas Trocki-n, kaj inverse, por citi nur unu ekzemplon. Tiu ideo, ke ateistoj amas unu la alian kvazaŭ fratoj estas tiom naiva, kiom la kredo, ke, se la homaro parolus unu lingvon, ĉesus la militoj.
Leo Polak havas teruran bildon pri kristanismo.
Ne, Dio ne ordonas. Ne, kristano ne amas sian proksimulon por eviti la inferon, nek por meriti la paradizon, sed ĉar li scias, ke amo al la proksimulo estas natura afero. Nu, mi ne scias, kion kredis efektive la nederlandaj kristanoj en 1931. Mi trovis piajn katolikajn librojn presitajn en Francio dum la sama epoko. Ekzemple, en libro pri la "infanoj de Maria", oni klarigas, ke pastroj devas instrui al la infanetoj preĝi al Maria, ĉar Kriston ili riskas tro timi. Do eble la nederlandaj kristanoj de 1931 efektive konfuzis Dion kun Big Brother. Sed en 1984 kristanaj infanoj ne timas Kriston. Alia punkto : Leo Polak supozas, ke teologoj ne kredas la dogmojn, kiujn ili inventas. Mi pensas la malon mi jam skribis en **Sennaciulo**, ke fanatikulo povas esti nur sincerulo. Sed mi ne volas skribi nun pri la problemo de sinceruloj, ĉar necesus pluraj paĝoj por klarigi tion.
Kiam li aludas pri budhismo aŭ aliaj ekstereŭropaj ismoj, Polak verŝajne skribas pri io, kion li ne konas. Mi rimarkas, ekzemple, ke li citas "budhistoj kaj ĉinoj", kvazaŭ ĉineco estus religio. Paroli pri io, kion oni ne konas, estas malracia kaj malhonesta faro.
Konkludo : se Leo Polak esprimus nur, kion li mem pensas, sen dediĉi multajn paĝojn al tio, kion aliaj supoze kredas, la broŝuroj estus perfektaj.

Jakelino.

### Oni neniam antaŭe scias...

Okaze de alveno de iu E-gazeto, mi legis en anonceto, ke oni povas antaŭmendi "7000 tagoj en Siberio" sen scii ĝian proksimuman prezon.
Ĉiam mi estas tre fervora leganto de E-literaturo por perfektigi mian stilon kaj konatiĝi kun vortoj, kiuj ne ekzistis en la tempo, kiam Zamenhof komponis iliajn radikojn. Ĉar la mondo ĉiutempe evoluas, oni

estas devigata krei novajn vortojn kiel esprimaĵojn. Por tio mi forsendis la mendilon kaj atendis.
Mi ne plu pensis pri tiu mendo, kiam post monatoj alvenis poŝtkarto kun la informo, ke la libro estas jam preta kaj se mi ĝin volas... mi forsendu 100 FF al tiu ĉi adreso : "Poŝt-restante", je la nomo de eldonanto... Trovante tiun ĉi sistemon stranga, mi forsendis la petitan sumon kun la penso, ke se mi perdos ĉi tiun monon, mi ne riskos en la estonteco perdi pli da mono kun tiu persono.
Post mallonga tempo mi ricevis ĉi tiun libron. Mi ĝin legis laŭ ĝia merito. La libron mi ŝatis, ĉar ĝi estas laŭ mia gusto kaj ĝin mi sendis al iu el miaj kamaradoj. Sed por mia biblioteko mi mendis alian ekzempleron kaj forsendis egalan sumon.
Hazarde, la persono, kiu sendis la libron, alvenis en mian loĝurbon, vizitis min kaj..."de fadeno al pinglo"... ni geedziĝis.
Tio min lernigis, ke neniam antaŭe oni povas scii kion fari por esti feliĉulo...

-nn-

*******************************************************

EL LA "LAŬTEJO" :

**Ankoraŭ iom pli por JULIA**

Post la 3a listo de mondonacoj, kiuj ebligis tute pagi la aĉeton de JULIA, ankoraŭ alvenis iom pli da mono - kiun ni tre certe bezonos por ĝia flegado. Dankon, dankegon al ĉiuj!
E.D. 100, J.C. 13,30, V.K. 274,88, A.L. 10, H.G. 500, G.L. 100, do sume : 998,18 FF.

**Nia adresaro**

Ne multaj E-gazetoj publikigas la liston de sia abonantaro. Eble, ĉar estus multekoste aperigi tion, kiam la listo estas longa, eble ankaŭ, ĉar multaj gazetoj estas samtempe asociaj organoj, kaj tiuj asocioj ne ŝatus, ke aliaj asocioj varbe rabu iujn el iliaj membroj, aŭ eble ĉar ne ĉiuj legantoj konsentus diskonigi sian adreson?...
"Laŭte!" (kaj ankaŭ la SAT-Adresaro - estas escepto en tiu ĝenerala sinteno. (Tamen, kiuj ne volas, ke ilia adreso aperu, tiuj povas resti nekonataj. La avantaĝo estas, ke la abonantoj povas rekte interrilati inter si.
Ni ne timas, ke aliaj E-gazetoj aŭ asocioj rabu nian abonantaron. Se tio okazus, tio simple signifus, ke aliaj gazetoj estas pli interesaj por iuj legantoj. Nia principo estas : ĉiu elektu sia(j)n

daŭrigo sur p. 35!

*******************************************************





# VORTOJ DE MALJUNULO

---- valo ----

## PRI LA UTILO DE IMPOSTOJ

Mi ricevis foliojn, sur kiuj mi devos deklari miajn enspezojn en 1983, cele al difino de mia imposto por 1984. Al tiuj folioj estas aneksita, krom la modo de uzado, tuta paĝo, per kiu la ministro pri ekonomio kaj financo afable informas min pri la utilo de mia imposto.

Li mencias ok grandajn partojn de la nacia buĝeto:
1. Solidaro, lukto kontraŭ senlaboreco, loĝado.
2. Formado kaj edukado de la homoj.
3. Kulturo kaj libertempoj.
4. Ĝeneralaj servoj (poŝto, polico, diplomatio, tribunaloj).
5. Decentralizado.
6. Scienca serĉado.
7. Francaj entreprenoj en la internacia konkurado.
8. Nacia defendo.

Pri kelkaj el tiuj ĉapitroj li komplezeme precizigas elspezotajn sumojn.

Ekzemple, pri la unua :
- Socia asekuro, pli ol 35 miliardoj.
- Por maljunuloj, pli ol 24.
- por plenkreskaj kripluloj, malfavoratoj de la naturo: preskaŭ 12 miliardoj.
- solidarkontraktoj, antaŭtempa emeriteco, reduktado de la labortempo : pli ol 7,5 miliardoj.
- subteno de la ŝtato al konstruado de 380 000 loĝejoj.

Pri la dua : 168 miliardoj por la edukado.
Pri la kvina : subvencioj al lokaj kolektivoj, 130 miliardoj
Pri la 7a, 45 miliardoj por la modernigado de la entreprenoj kaj ilia adaptiĝo al la nuna teknika evoluado.

Kontraŭe, la dokumento estas pli diskreta pri du punktoj.

*Kulturo : oni ja mencias kelkajn muzeojn, konservatoriojn, helpojn por arta kreado. Pri la koncernaj kostoj, nenio. Ĉu oni eble hontas pri la relativa modesteco de la sumoj dediĉataj al la kulturo?*
*"Nacia defendo". Oni ja sciigas al ni, ke la nuklea "malinstigado" uzas 20% el tiu ĉapitro, sed kiom da miliardoj por la tuto, aŭ kioma procento el la suma buĝeto? Pri tiuj demandoj, Lia Ministra Moŝto ne degnas kontentigi nian maldiskretan scivolemon. Ĉu oni ne kuraĝas konfesi la grandegon de tiuj elspezoj?*
*Cetere, tio ne estas speciala al Francio. En ĉiuj landoj, mizeraj almozoj por la kreado, gigantaj oferoj por la detruado. La grasa dio de milito fartas bone, dankon.*

---

## INTERKOMPRENO (sekvo)

*Leginte miajn lastajn "Vortojn", amiko mia diris:*
*- Vi pretendas, ke per nia lingvo diversnacianoj facile komprenas unu la alian. Tamen vidu : por ekzemplo ni prenu vorton kiel "demokratio". Ĝi estas tre malsame komprenata en Moskvo kaj en Vaŝingtono.*
*Mi respondas :*
*- Ja. Ankaŭ en la du germanaj respublikoj, kiuj tamen parolas saman nacian lingvon. Do tio ne dependas de ia "nacia spirito", sed de ŝtata ideologio.*
*Eĉ en Francio : la vorto "libero" estas aparte ŝatata; sed ĝi ricevas tute malsamajn sencojn, ĉu en la buŝo de katolika ano de la "libera" (= religia) lernejo, ĉu en tiu de liberpensula ano de la laika - kvankam ili estas samlingvanoj kaj samnacianoj.*
*Do ni ne parolu pri nacia spirito, sed pri politikaj, filozofiaj, religiaj ks ideoj. Mi pretendas, ke oni pli facile komprenas alinacian samideanon ol samnacian aliideanon.*
*Cetere, ni precizigu la sencon de tiu vorto "samideano". Ĉu ĝi signifas, ke ĉiuj niaj ideoj estas samaj? Ne, sed ke almenaŭ unu estas al ni komuna. Pri la ceteraj - nu, ni strebu esti toleremaj.*
*Eĉ helpante nin per bona vortaro kiel PV aŭ PIV, ni ne ĉiam evitos miskomprenojn. Ni almenaŭ provu ilin malpliigi per bonvolema atento. En diskutado mi penu plej bone klarigi mian penson, kaj mi penu klare kompreni tiun de la kontraŭa argumentanto.*



*Li povas esti prava, se ne entute, almenaŭ pri iuj punktoj. Li estas homo kiel mi, liaj vortoj estas indaj je mia atento. Ni aŭskultu unu la alian, kio estas pli malfacila ol oni kredas. Plejofte oni aŭskultas nur sin mem, kaj la diskutado fariĝas dialogo de surduloj. Samideanoj, ni ne estu surdaj al la voĉo de niaj similuloj : per ĝi nia propra penso povas ricevi pliriĉigon.*

**Valo**

---

*EL LA "LAŬTEJO" (daŭrigo):*

kaj sia(j)n gazeto(j)n laŭ sia prefero.
Ni scias, ke el nia adresaro ĉerpas pluraj E-gazetoj kaj eĉ franclingvaj por sendi specimenojn el siaj publikigaĵoj. Se iuj el la abonantoj de L! interesiĝas pri tiuj gazetoj, des pli bone! Fakte, ricevi specimenon ne devigas al abonado.
Ĉar en iuj landoj ne regas la sama esprimlibero kiel en aliaj, ni ne publikigas la adresojn de niaj tieaj legantoj, escepte se la leganto mem skribe petas la aperigon, kompreneble. (Same, pri la adresoj de legantoj, kies abono estis donacita de amik(in)o).

### Justo...kaj digno

Iuj E-grupoj aŭ unuopuloj sendas al L! komunikojn. Pri tio nia regula estas simpla : Ni aperigas tion senditan de la abonantoj. Se la sendinto ne estas abonanto, ŝi/li ne miru pri neaperigo de la komunikoj en L!. La mono de la abonantoj devas utili unue al abonantoj, ĉu ne? En tio estas nenia sektemo sed nur afero pri justo.
Pro apliko de la sama principo, ni ne povas daŭrigi la sendadon de L! al la pasintjaraj legantoj, kies abonkotizon ni ne ricevis. Ni bonvolas sendi la unuan numeron de la nova jaro, sed poste ni opinias, ke plua silento de la nereabonintoj signifas rezignon. Ni ja scias, ke iuj ne reabonas pro forgeso. Sed kiel diveni la nomojn de tiuj trafitoj de forgesemo? Ni supozas nur, ke se la gazeto vere interesus ilin, tiam ili ne forgesus reaboni. Kaj ni ne deziras almozpeti reabonon de homoj, kiuj fakte pagus nur pro nia insisto. Ni respektas la dignon de la leganto. Oni komprenu, ke ankaŭ la eldonanto havas propran dignon. Tamen, amike al ĉiuj, Kribo.

*********************************************

*Se mi pensas pri rekompenco, mi ne estas virta, ĉar la virto karakteriziĝas per la neprofitemo.*

*HAN RYNER*

# PARAGVAJO : TORTURO KAJ MALLIBERIGO

Amnestio Internacia lanĉis la 22an de februaro 1984 novan agadon por finigi malliberigon kaj torturadon de paragvajaj civitanoj, kiuj provas uzi siajn fundamentajn rajtojn. En raporto publikigita je tiu tago, Amnestio Internacia denuncas la murdojn, la arbitran malliberigon kaj la torturadon de personoj el ĉiuj sektoroj de la socio laŭ la "stato de urĝeco" dekretita antaŭ 30 jaroj, ĉe la alpotenciĝo de Prezidento Alfredo Stroessner.

Tiu dokumento signas la lanĉadon de kampanjo de la membroj de A.I. por devigi la paragvajajn aŭtoritatojn fini tiujn misfarojn kaj konigi la sorton de dekoj da politikaj malliberuloj "malaperintaj" dum sia malliberο.

A.I. atentigas en tiu dokumento pri kazoj de gravedulinoj, infanoj kaj maljunuloj arestitaj de la registaro.

En kromdomo de la ĉefstabejo de la polico en Asunciono, konata je la nomo "laboratorio", okazas noktaj torturadoj, dum kiuj, laŭ raportoj ricevitaj de A.I., politikaj suspektatoj estas batataj, vipataj, torturataj, ĉu per elektro per bestpikiloj, ĉu per metado de la kapo en akvon malpurigitan per fekaĵoj ; ili estas pendigataj je la maleoloj kaj tenataj dum longaj periodoj en mallarĝaj kaĝoj.

La Komisiono pri Homrajtoj de UNO ekzamenos dum sia venonta kunsido en Ĝenevo admonon prezentitan al ĝi fare de la subkomisiono pri misuzoj farataj laŭ la aranĝoj de la "sieĝostato".

Por ilustri la rifuzon de la taŭgaj proceduroj kaj de la rajtoj, la raporto de A.I. citas la kazon de Guillermo Escolastico Ovando, eksserĝento de la armeo, mallibera de pli ol 21 jaroj. Li estis ŝoforo servanta kapitanon Modesto Napoleon Ortigoza, kiu supoze iam estis la rivalo de generalo Stroessner.

Serĝento Ovando kaj kapitano Ortigoza estis arestitaj kun aliaj personoj en 1962 kaj akuzitaj pri respondeco ĉe la morto de kadeto kaj pri partopreno en komploto por forigi la prezidenton. Oni deklaris ilin kulpaj surbaze de atesto kredeble eltrudita el unu el la akuzitoj per torturo.

Ilia advokato estis publike minacita fare de la policestro kaj estis poste malliberigita, batita kaj forpelita el la lando. Serĝento Ovando, kredeble torturita post sia arestiĝo, estis kondamnita al morto, sed la verdikto estis ŝanĝita al 15 jaroj da mallibero. Lia puno finiĝis en 1977, sed li restas mallibera, same kiel kapitano Ortigoza.

Inter la malliberuloj, kiuj antaŭ nelonge denuncis torturon, troviĝis la dungitoj de esplorinstituto, "Banco Paraguaya de Datos" kaj personoj akuzitaj pri aparteno al komunisme influataj organizoj.

La raporto citas la nomojn de proks. 45 personoj, kiuj "malaperis" post sia arestiĝo aŭ forrabiĝo, aŭ kies morton la aŭtoritatoj ne taŭge klarigis. Inter ili troviĝas 10 kamparanoj mortigitaj de la armeo en



1980 en la departemento de Caaguazu. Ili apartenas al grupo, kiu ekkaptis aŭtobuson por veturi al la ĉefurbo por protesti kontraŭ sia forpeligo el siaj terenoj.

Alia persono arestita lige kun la afero de Caaguazu, Marcelino Casco, pli ol 70-jara, kredeble mortis en la malsanulejo de la prizono, post kiam oni batis lin, devigis lin staradi ĉe la suno dum pluraj horoj, kaj poste trudis, ke li supren- kaj malsuprengrimpu ŝtuparojn.

A.I. mencias ankaŭ proks. 50 paragvajanojn "malaperintajn" en Argentinio. En iom da kazoj, ekzistas pruvoj, ke la viktimoj estis trandonitaj fare de la antaŭaj argentinaj aŭtoritatoj al la paragvajaj sekurecaj fortoj. Ĉe la ekpresado de la raporto, estis en Paragvajo kvindeko da politikaj malliberuloj, laŭ la informoj posedataj de Amnestio Internacia.

Referencoj de la franclingva eldono de la menciita raporto :
AMNESTY INTERNATIONAL. - Paraguay : en état de siège depuis 30 ans.- Editions Francophones d' Amnesty International, Paris.
Prezo : 10 FF (14 FF kun la sendado).
Havebla ĉe : Amnesty International,section française, 18 rue Théodore Deck, F 75015 PARIS, aŭ ĉe la lokaj grupoj.
La originalo, en angla lingvo, estas disponebla ĉe : Amnesty International 1 Easton Street, LONDON WC IX 8DJ, Britio.

Komunikis Jakelino.

*****************************************************************

## INTERNACIA TENDARSEMAJNO en HALL - NL de 26.5 ĝis 2.6.1984

De la 26a de majo ĝis 3a de junio, FLE organizos internacian studferian semajnon sur kampadejo en Hall - Nederlando.

La programo : tendumi en ĉarma arbara ĉirkaŭaĵo, prepari mem la manĝojn, E-lecionoj en grupetoj laŭ nivelo, ekskursoj, sportoj kaj ludoj, okupi sin pri desegnado, pentrado, fotado, ludi teatraĵojn, vegetara kuirado, la naturo, muzikado kaj popoldancado.

Ni kiom eble plej multe parolos Esperanton. Do por komencantoj kaj progresantoj ŝanco por lerni kaj praktiki la lingvon je agrabla maniero. Junaj kaj maljunaj, veraj komencantoj sed ankaŭ progresantoj, ĉiuj estas tre bonvenaj. Propraj ideoj kaj deziroj pri la programo estas ankaŭ bonvenaj.

Estas loko por 60 partoprenantoj. Ĉiu kunportu mem tendon ktp kaj prizorgos la proprajn manĝojn.

La kostoj estas : nokte po 4,50 f por personoj ĝis 21-jaraj, po 6 f. por pli maljunaj. Por Nivonanoj : po 3 f kaj po 4 f.

Aliĝkostoj : por personoj ĝis 21-jaraj : 5 f., por pli maljunaj 10 f. Post ricevo de aliĝkostoj ni sendos al vi pli da informoj. Por aliĝi kaj informoj : Ria Hoogeland, Vlasdonk 1, NL 1112 JD DIEMEN
Por ĝiri : ĝirkonto : 5459931




## SAT-JUNULFAKO KOMITATO petas :

Dum la lasta kunsido de la SAT-junulfako, la 14an de januaro en Parizo, ni i.a. decidis aperigi kantlibron kun muziknotoj. Ni pensas pri novaj kantoj, ekz. packantoj, amkantoj, socikritikaj kantoj, folkloraj kantoj ktp.
Se vi havas tiajn kantojn, kompreneble en Esperanto, bonvolu sendi ilin al mi : Ursula Böhringer, Eisenbahnstr. 5, D 7415 Wannweil.
Kiu volos helpi, traduki novajn kantojn en Esperanton?

## INTERNACIAJ FOLKLORAJ FESTIVALOJ

En multaj francaj urboj, certe ankaŭ en multaj eŭropaj kaj aliaj urboj, floras ĉiujare Internaciaj Folkloraj Festivaloj. Tiuj manifestacioj kunigas dum pluraj tagoj aŭ semajnoj, folklorajn teamojn. Tiuj teamoj alvenas el multaj malsamaj landoj. Ilin ligas muziko, danco, vesto, en malsameco. Sed malligas ilin la malsameco de iliaj lingvoj : la lingva barilo staras ankaŭ inter la teamaro kaj la akceptantoj kaj spektantoj. Ĝi malhelpas la organizon, la kontaktojn, la komunikon, kiuj volus sin amikaj.
Estas okazo por homoj konscii pri la lingva problemo. Estas okazo por ni esperantistoj montri la taŭgecon de nia lingvo. Esperantista agado estas farenda en tiuj medioj.
En la ĉirkaŭaĵo de nia esperantista rondo ĉiujare okazas internacia folklora festivalo, ĉu en hispana nordokcidenta urbo JACA (Ĥaka), ĉu en franca sudokcidenta urbo OLORON. Montaro Pireneoj kaj cento da kilometroj dispartigas la du urbojn. La festivalo daŭras unu semajnon. Tiun ĉi jaron ĝi okazos en Oloron de la 31a de julio ĝis la 6a de aŭgusto. Dekkvinon da grupoj el dekkvin nacioj oni povas atendi. (En 1982, en Oloron partoprenis 18 grupoj el 18 nacioj ; en 1983, en Jaca, 12 grupoj el 11 nacioj).
Informojn petu ĉe : Esperanto Pau-Adour (J. Decobert)
Centre Social de la Pépinière, F 64140 PAU.

**Jen nia projekto**

1. Ekde nun

11. Obteni de la loka organizanta komitato la adresojn de ĉiuj partoprenontaj teamoj.
12. Kontakti tiujn teamojn perletere en Esperanto kaj france.
13. Sendi al ili, rekte, aŭ tra UEA, dokumentojn pri Esperanto en ilia propra lingvo kun letero por atentigi ilin pri la antaŭvidata E-agado en la urbo Oloron.
14. Samtempe peti la afablan kunlaboron de la esperantistaj najbaroj de la koncerna folklora grupo.

2. Dum la disvolviĝo de la festivalo

21. Starigi esperantistan budon kaj deĵori ĉe ĝi.
2. Havigi al si kunlaboron de la lokaj komercistoj, por ke ili vendu

esperantaĵojn (librojn, diskojn, ĉemizetojn, ktp) kaj elmontru ilin en montrofenestroj,
23. anonci en la festivala libro pri esperanto kaj ĝia agado (tiu libro estas vendata antaŭ kaj dum la festivalo).
24. Malavare disdoni flugfoliojn pri E° (ne flugendaj...) en diversaj lingvoj.

## ANONCETO

Por perfektigado en Esperanto Eldonejo "PLEJADO" proponas facile legeblajn verkojn : **Leo Tolstoj** de V. Lebrun (400 p., 40 gld.), **Regulus** de Lorjak (340 p., 30 gld.), **La mezepoka, La renesanca, la klasika, la romantika periodoj** de G. Waringhien (kvar volumoj, kune proks. 900 p., 98 gld.), **Donjuano Tenorio** de Zorrilla (200 p., 20 gld.). Mendu ĉe : SAT, UFE, aŭ ĉe Lina Gabrielli, Via Arno, 31/3, I - 63031 CASTEL DI LAMA (Italio), aldonante 10% por la sendkostoj. Por mendoj de 3 ekz. de la sama titolo, rabato 33%.

## RADIO ESPERANTO EKVENKIS

En 1981 en Parizo, la unuan de septembro, naskiĝas "Voĉo sen mastro", grupiĝo de 4 liberaj kaj lokaj radiostacioj, i.a. Radio Esperanto elsendas ĉiusemajne. Post kelkaj monatoj, dank'al la atento de la aùskultantaro, Radio Esperanto duobligas siajn elsendaĵojn. Dum du jaroj ĝi organizas plurajn subtenajn festojn, tamen ĝi restas ignorata de la ŝtato:
- malpermesita la 10an de majo 1983,
- konfiskita la 28an de aùgusto 1983,

ĝi organizas, sukcese, grandan manifestacion la 3an de septembro kaj reelsendas la 5an de septembro per nova materialo.
- oficiale permesita la 4an de novembro 1983,

ĝi rajtas partigi frekvencon kun kvina radio "Radio Montmartre". Nuntempe, Radio Esperanto trasuferas proceson kontraù alia asocio pro la misgrupiĝo de la parizaj radioj, ankaù pro la malbona dispartigo de la frekvencoj... La batalo por la esprimrajto pludaùras.

Radio Esperanto, januaro 1984.

*****************************************************

*En la venonta "Laŭte!" vi trovos aliajn vidpunktojn pri nia debato "Laboro, sendungeco, rajto je pigro", originalan novelon de nova kontribuanto: "La ĉefo nomiĝas Krak", kaj la kutimajn rubrikojn, ...laŭ ĉies verkemo.*

*****************************************************



# dua informilo - - - VILLANDRAUT 84

## INTERNACIA JUNULARA RENKONTIĜO

### PROGRAMO
**27/31 JULIO 84**

Vendredon 27an : 17a/19a - Akcepto. 21a/23a - Interkona vespero

Sabaton 28an : 9a/12a - Debato pri Esperanto
14a/15a - Magia lumbild-prezentado pri nia bela regiono
15a/19a - Por drinkuloj, perbicikla ekskurso tra la vinberejo "Sauternais". Por pli dancemaj, inico al vizito de mezepoka kastelo : tie, inico al la arkeologia serĉado. (LAŬVOLE !)
Por (ankoraŭ pli) dancemaj, inico al la gaskonaj dancoj.
21a/23a - GASKONA FOLKLORMUZIK-FESTO ! kun PERLIMPINPIN FOLC

Dimanĉon 29an : 9a/12a - Debato : "ĈU BALDAŬ MONDMILITO?" partopreno de germanaj kaj francaj pacistoj.
14a/19a - Perbicikla promenado tra herbeja regiono "Bazadais". (LAŬVOLE!)
- Perpieda promenado tra pitoreska "Ciron"-valo.
21a/... - FRENEZA VESPER-ANIMADO ESPERANTISTA! kun Ĵak LE PUIL, SERĜJO SIRE kaj (verŝajne) FERI FLORO.

Lundon 30an : 9a/12a - Debato : "ETNAJ PROBLEMOJ AKTUALAJ" kun J. Moritz (revuo Etnismo) kaj okcitanaj aktivuloj.
14a/19a : GRANDA EKSKURSO AL PINARBAREGO
- vizito de ekologia vilaĝo "Marqueze"
- banado en ĉarma lago.
21a/23a : ĴAZ-ANIMADO kun la "LUBAT-TRUP" ! (teruraj muzik-nekonformistoj)

Mardon 31an : 9a/12a : Debato (temo ne fiksita) ĉiuj proponoj bonvenaj!
14a/19a : Perbicikla promenado tra pinarbarego
- MALSUPRENIRADO PER KANUO de rivereto "Leyre" (deviga naĝkapablo).
21a/.... : - projekciado de filmoj kaj movbildoj.
- Por plej aventuremaj, meznokta banado en lago!

Merkredon 1an : - MALGAJA DISPARTIGO
La diablaj SAT-anoj iros al SAT-kongreso!

Kisojn! O.K.

## BONVENON AL ĈIUJ EN VILLANDRAUT !

Tiu ĉarma vilaĝo situas 40 km sude de BORDEAUX, ĉirkaŭita de diversaj pejzaĝoj : pinarbarego, vinberejo, ondumantaj herbejoj. Proksima estas la Atlantika Ocean-marbordo (nur 60 km) !

Ni loĝos en agrabla mezlernejo kun vasta apuda herbejo por tendumi. Pri la manĝado zorgos la vendejo pri biologiaj nutraĵoj "Docteur Knock".

**Puran aeron, bluan ĉielon, varmetan akvon** la O.K. garantias! Ni ne forgesu la drinkulojn ; en la vilaĝo tri simpatiaj kafejoj volonte akceptos ilin.

Dum la renkonttagoj vi uzos libere biciklon por promeni (regiona mapo plezure donacita).

Atentu! Terura skipo armita de video-aparato filmos senhezite kaj senkompate viajn diboĉaĵojn. Poste tiu filmo estos projekciita en SAT-kongreso.

Ĝis baldaŭ! Amike! la O.K.

**la trian informilon (praktikajn informojn) nur la aliĝintoj ricevos!**

************************************************

## FARIĜU BROŜURABONANTO EKDE 1984!

***EN 1984 vi ricevos :***

* *La racia kaj ateista budhismo (36 p.)*
* *Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo (Leo Polak) (16p.)*
* *Jaro 2000 (Henri Muller) (166 p.)*
* *Konstrui fajron (Jack London) (28 p.)*
* *Ĉu ni vere helpas la trian mondon? (Glyn Roberts)(60p)*
  (tiun vi ricevos,nur se vi ne ĉeestos la SAT-kongreson)
* *Tiel diru! (Lentaigne) (132 p.)*
  ((tiun vi ricevos aŭtomate, nur se vi estas franclingvano)

***Vi ĝuos aŭtomate 20-procentan rabaton kaj ne pagos la sendkostojn.***

*Se vi jam estas abonanto de "Laŭte!", bonvolu ĝiri minimuman provizon : 80 FF. La mono restanta en via konto pagos aŭtomate vian reabonon al **Laŭte + broŝura serio** en 1985.*

Ĝiri al : Cercle amical espérantiste de l'Agenais
poŝtkonto 3371 74 M Bordeaux
kun jena mencio sur la ĝirkupono : "abono al BS ekde 1984".
Jarfine vi ekscios kiom restas en via konto. Dankon!






## KOTIZOJ

*(En Francaj Frankoj)*

*Aliĝkotizo : ĝis la 15 a Junio, 50 FF...............=*
*post la 15 a Junio, 100 FF............=*
*surloke, 125 FF......................=*

*Tranoktado : en klasĉambro, 50 FF................=*
*tendumado senpaga...................*

*Pensiono : 4 tagoj, 200 FF.........................=*

*Luado de biciklo : por 4 tagoj, 90 FF.............=*

*Luado de kanuo : 40 FF.............................=*

*Festoj : 60 FF......................................=*

*Sumo =*



ATENTU ! Pagu je la nomo de la kasisto :

Gilles LAFITTE
bankk. "Société Générale"
00050275826 Bordeaux-Chartrons

## aliĝilo

*Familia nomo :* ........................................

*Antaŭnomo :* ........................................

*Naskiĝdato :* ........................................

*Adreso :* ........................................

*Lando :* ........................................

*Ĉu vi estas komencanto en E^o ? : JES / NE*

*Kiamaniere vi intencas vojaĝi ? : AUTOMOBILE / TRAJNE / VETURPETE /* ........................................

*Mi deziras lui biciklon : JES / NE*

*Mi partoprenos en la ekskurso per kanuo : JES / NE*

*Kiamaniere vi intencas tranokti ? : TENDUME (senpage)/ EN KLASĈAMBRO (page) ; NEPRE kunportu dormsakon !*

*Mi deziras kontribui en la programo jene :* ........................................

........................................

$ $ $ $ $ $ $ $

SENDU ALIĜILON KAJ MONON AL SEKRETARIO :



Jean Luc BERARD
10 rue Maryse Bastié
Bât. C5, N° 18
33300 BORDEAUX (Francio)

# laŭtaj informoj kaj petoj (ALDONO POR FRANCIO)

## Informoj pri la instruado de Esperanto en la Universitato de Provenco

Dum la jaro 1983 ekzameniĝis 41 gestudentoj por la du instru-unuoj de la lingvo Esperanto. Sukcesis 29.

Dum la nuna jaro la instruadon de Esperanto prizorgas du instruistoj: Michel Duc Goninaz gvidas la unuagradan kurson kaj Daniel Moirand (licea instruisto pri la rusa lingvo, diplomito pri Esperanto de la Provenca Universitato kaj de Franca Esperanto-Instituto) gvidas la duagradan. Tio signifas, ke la Universitaton dungis ĉi-jare - sed provizore - novan instruiston por Esperanto.

Ambaŭ kursojn sekvas ĉ. 35 gestudentoj, kiuj, krom la kursoj, disponas la uzadon de la lingva laboratorio, kie ili povas ekzerciĝi memserve per surbendigitaj ekzercoj.

La universitata biblioteko posedas ĉ. 20 esperantajn librojn. La biblioteko de la Esperanto-sekcio (parto de la biblioteko de la Instituto pri Ĝenerala Lingvistiko kaj Orientaj kaj Slavaj Studoj) enhavas preskaŭ 700 volumojn, plus multajn revuo-kolektojn, kaj ricevadas 10 esperantlingvajn revuojn. Por krei sliparon de tiu biblioteko, ĵus dungiĝis studentino, kiu laboros dum unu monato (en marto 84).

La 26-an de marto, la Esperanto-sekcio okazigos studtagon pri la problemo de la instruado de Esperanto (instrumetodoj, lernolibroj, kondiĉoj de instruado...). Personoj, kiuj havas sperton sur tiu tereno, ĉu lerneje ĉu eksterlerneje, estas invititaj prezenti referaĵojn kaj partopreni la diskutojn de tiu studtago. Oni skribu por informoj al: Université de Provence, Section d'espéranto, 29 rue Robert-Schuman, 13621 AIX EN PROVENCE.

## En Langvedoko-Rusiljono

Plurnivela lingvo-staĝo okazos en Valras-Plage, apud Béziers, de la 28a de Aprilo ĝis la 1a de Majo. La aliĝo kaj kursoj estas senpagaj. Informas : Cercle Biterrois d' Espéranto, 9 rue G. Picot, 34500 BEZIERS (tel : (67) 31.13.18)

Printempa kunveno de la Federacio Langvedoko-Rusiljono okazos en Millau (Aveyron) :

- sabaton la 19an de majo : debato, ekspozicio, lumbildoj...
- dimanĉon la 20an : kunveno, prelego kaj pikniko.

Informas : J. HENIN, Collège, 48500 LA CANOURGUE (tel:(66)32.86.36)

* Por sia aĝo, ŝi ankoraŭ estas sufiĉe juna (encore jeune pour son âge). * Se juneco estus sperta, se maljuneco estus lerta! (si jeunesse pouvait...)
**JOIE** (ĜOJO) * Senlima, senbrida, senmezura, eksploda, paradiza ĝojo. Ebria de ĝojo (ivre de joie). Imagu mian ĝojon * Trovi ĝojon en io * * Plenigas lin senbrida ĝojo (une immense joie emplit son coeur) * *Fari ĝojon al iu (créer de la joie à qq.). Ĝojo sanigas (fait du bien). Elpuŝi ĝojkrion.*
***JOINDRE*** ** Kunigi/ligi utilon kun agrablo * Ekvilibrigi la buĝeton (joindre les deux bouts).*
**JOUE** (VANGO) * Vangoj palaj de anemio * Survangi iun (gifler) * Al tiu, kiu frapas vian dekstran vangon, turnu ankaŭ la alian.
**JOUER** (LUDI) (V. JEU) * Ludi kiel kato per muso * Fari ion kvazaŭ ludante (en se jouant).
**JOUG** (JUGO) * Kurbiĝi sub la jugo de despotismo. Forskui, deĵeti la jugon.

Jen ĉi-supre ekstrakto el la tra baldaŭ preta, nova kompilaĵo de amiko LENTAIGNE : **"TIEL DIRU!"**. La tajpanto, erarinte en sia elekto de literaro, preferis ne uzi la ofsetplaton por la broŝuro, sed, anstataŭ forĵeti ĝin, li senskrupule trudas ĝin al la gelaŭtuloj. Tiuj tamen bonvolu pardoni la malicaĵon kaj legi sur la lasta paĝo de tiu ĉi L! la vendkondiĉojn de **"TIEL DIRU!"** !
Kribo.

*****************************************************

**Anonceto :**

Kiu povos helpi novan laùtulon Michel LEGRIS, F 65330 GALAN, kiu kolektas E-stampojn, havigi al si (aĉete aù interŝanĝe) la E-stampon de la Esperanto-kongreso en MARMANDE, 1952 ?

*****************************************************

## Novaĵoj pri la peticio rilate al la leĝpropono n°1550

Post la unua milo da subskriboj senditaj de la Ĝirondia grupo al S-ro Savary, la grupo de Paimpol ĵus sendis la duan milon. La agado ne estas finita. Ni laboru por sendi la trian milon, kaj kial ne la kvaran kaj la kvinan? Ĉu ĝi fruktodonos? Ni vidos...
Tamen ni rajtas montri nian malkontenton. Se oni opinias, ke E estu instruita en la lernejoj, logike ĉiu devas tiucele labori...kaj subskribigi la peticion. Tute facila estas la laboro. X.A. kolektis 421 subskribojn en du monatoj! Do, bonan kuraĝon!

Nia printempa akvitania kunveno

# La 19an/20an de majo, E-renkontiĝo en STE-FOY-LA-GRANDE (Ĝirondio)

*Ĝi okazos en "Salle Paul Bert" (lerneja manĝejo), avenuo Paul Bert (kiu kondukas al la stacidomo). Jen la programo:*
***Sabate posttagmeze*** *- 15h : Ekzamenoj (Atesto pri lernado kaj Atesto pri praktika lernado).*
*17h : Vizito de la prahistoria muzeo (vere sciencvalora!), aŭ vizito de fandmodla muzeo (farita laŭ songo de terkulturisto), aŭ vizito de ceramiklaborejo (Jean Corriger) Indiku vian preferon.*
*19h : Ni kune manĝos memportitan manĝaĵon, Salle P.Bert, aŭ en restoracio.*
*21h : DISTRA VESPERO, en "Salle Paul Bert".*
***Dimanĉe matene*** *- 9h : Vizito de la urbo sub gvido de Jean Vircoulon.*
*10h : Mallonga piedmigrado tra la agrablaj pitoreskaj montetoj en la ĉirkaŭaĵo de Ste-Foy.*
*Por la ne-piedmigremuloj, vizito de la gallo-romia situo en Montcaret, je la 10a kaj duono.*
*12h : En simpatia etoso, ni piknikos.*
vd. mapeton dorse!

---

**Bonvolu anonci vian partoprenon antaŭ la 2a de majo al :**
*Laura VIEILLEFOND B.P.n°8, 33220 Ste-FOY-la-GRANDE*
*NOMO :*
*Antaŭnomo :*
*Adreso :*

*Mi(ni) alvenos pertrajne*
*peraŭtomobile*
*sabate matene:* *sabate posttagmeze:*
*dimanĉe matene:*
*Mi(ni) tendumos.* *Mi(ni) tranoktos en hotelo*
*Mi(ni) vespermanĝos en restoracio:*
*Mi(ni) trapasos ekzamenon:* *Atesto pri lernado*
*Atesto pri praktika lernado*


---

Bonvolu sendi la subskribitajn peticiojn


al Ginette Gabillon
32 rue Renault
33200 BORDEAUX CAUDERAN

*aŭ*

al Sylvestre Guillou
25 chemin du Terron, Kérity
22500 PAIMPOL




ANKORAŬ PLI FORTAJ DANK'AL ESPERANTO!






## ĈU PLU BROŜURUMI ?

broŝurojn, mi konfesas, ke mi estas tute ne naturdotita por disvendi tiujn "produktojn". Nature, mi pli inklinus disdoni, ol "komerci". Sed tio estas kondamninda utopio en nia socisistemo, ĉu ne?
Mi do revis, ke povus veni pli da interesiĝo al la broŝurservo unue de la SAT-anaro. Alvoko en "Sennaciulo" restis preskaŭ seneĥa. Aludeto en "Laŭte" januara ne estis pli sukcesa. La nura ĝisnuna fidela "klientaro" de la broŝurservo konsistas el tiuj kelkdekaj broŝurabonantoj kaj el pluraj E-libroservoj, kies prizorgantojn mi ĉi tie kore dankas.
**Kiel plibonigi la situacion?**
Mi espere atendas de ĉiu interesato kelkajn sugestojn aŭ help-proponojn, kiuj povos favore evoluigi la aferon. Kiuj pretas recenzi la novajn broŝurojn por diversaj E-gazetoj? En la nunaj cirkonstancoj ni ne povas liveri senpagajn specimenojn al la plimultaj E-gazetoj por recenzadoj.
Kiuj pretas mem disvendi broŝurojn en sia regiono aŭ okaze de kongresoj/renkontiĝoj, kiujn la eldonanto ne povas mem ĉeesti? Disvendemuloj povas ekzemple mem elekti kiujn broŝurojn elmontri, kaj indiki kiom da ekzempleroj necesos. Ili ricevos la broŝurojn plus kelkajn disdoneblajn mendilojn/abonilojn kaj repagos al la broŝurservo nur poste, laŭ la disvenditaj kvantoj. La nevenditajn broŝurojn ili povos aŭ konservi por venonta okazo aŭ redoni al la B.S. okaze de renkontiĝo (eviti la perpoŝtan resendon!). 20% el la ricevita mono ili povas konservi por kompensi siajn elspezojn kaj sian... komplezon.
Kune kun ĉi tiu n-ro de "L!" la abonantaro povas legi mallongan tekston, kiu aperis broŝurforme. Tio estu instigilo por tiuj, kiuj ĝis nun hezitis aboni **al la tuta**

serio. Se senteble kreskos la nombro da broŝurabonantoj, kaj se plivastiĝos la disvendado, la broŝurservo povos multe pli bone funkcii, kun ankoraŭ pli moderaj prezoj. Se ne, iuj manuskriptoj devos plu ŝimi en tirkestoj, verkemuloj eĉ ne plu emos ion surpaperigi.
Estus domaĝe por la tuta "Afero" ĝenerale.

Kribo.

## Al la broŝurabonantaro :

Broŝurabonanto miris, ĉar li ne ricevis broŝurojn, kies apero estis anoncita en L! Ne miru! Mi ne sisteme dissendas al la abonantaro ĉiun novan broŝuron en aparta koverto, sed prefere atendas, por ŝpari tempon kaj afrankon, ke estu sufiĉe peza sendotaĵo (250 aŭ 500-grama) el pluraj novaĵoj. Tiel mi sendas nur unu-du fojojn jare. Kompreneble, se iu abonanto intertempe mendas alian materialon, tiam mi profitas de la okazo, ŝovante en la pakon la tiam livereblajn novaĵojn.

Nu, nun estas pretaj **ĉiuj** broŝuroj jam anoncitaj por 1984. Iom post iom efektiviĝos la dissendado, sed mi profitos ankaŭ de la venontaj kongresoj (SAT-Amikaro kaj SAT en Francio) por rekte "liveri" al la abonantoj, kiujn mi tiuokaze renkontos. Krome, la interesega broŝuro "Ĉu ni vere helpas la Trian Mondon? de Glyn Roberts estos aŭtomate donacita al ĉiuj, kiuj aliĝos al la ĉi-jara SAT-kongreso. La temo estos ja pritraktita debate okaze de la kongreso. Kompreneble, tiuj broŝurabonantoj, kiuj ne partoprenos en Bordozo, ricevos ĝin laŭ la kutimaj kondiĉoj.

## Speciale por franclingvanoj : "TIEL DIRU!"

Post nur kelkaj tagoj aperos nova kompilaĵo de amiko LENTAIGNE, speco de suplemento al KIEL DIRI, kun 5000 E-esprimoj ordigitaj ne laŭ temoj sed laŭ alfabeta sinsekvo, same kiel banala vortaro. Notindas, ke nur 1/5 el la enhavo estas komuna al ambaŭ libroj. Posedanto de ambaŭ libroj disponos do sume 8000/9000 diversajn esprimojn. Kia ĝuo!

La vendkondiĉoj tute similas al tiuj de "Kiel diri" :

Vendoprezo : 20FF + afranko. Por minimume 5-ekzemplera mendo: 16FF por ĉiu ekzemplero kaj vi ne pagos la afrankon.

Francaj broŝurabonantoj ricevos ĝin aŭtomate je favora prezo.

Al kiuj ankoraŭ ne posedas "**Abrégé pratique de la grammaire Espéranto**" ni vigle konsilas samtempe akiri TD + GE !

Kaj se poste oni ankoraŭ kulpos atencojn kontraŭ Esperanto, vere estos senesperige!

*************************************************

la venonta numero aperos meze de majo

*************************************************

Gérant-imprimeur : Baudé, 47340 Laroque Timbaut. CPPAP 58651

Les soussignés, convaincus

- qu'une langue universelle serait un facteur de compréhension et d'échange entre les personnes et les peuples,
- qu'une langue universelle permettrait de découvrir ou d'approfondir des cultures inconnues du fait de la barrière linguistique,

estiment que l'ESPERANTO - Langue Universelle bien enracinée dans plus de 80 pays - apporterait une solution satisfaisante aux problèmes de communication.

Ils souhaitent que l'ESPERANTO soit enseigné dans les Etablissements scolaires et universitaires.

Dans ce but, ils se déclarent prêts à soutenir toutes les initiatives prises par les associations espérantistes, afin qu'un Projet de loi conforme à l'esprit de la Proposition de loi n° 1550, soit présenté, dès que possible, à l'Assemblée Nationale.

| NOMS | ADRESSES | SIGNATURES |
|---|---|---|
| | | |